

FENIX

ESPERANTO
★
NEDERLAND



16a jarkolekto n-ro 2 marto - aprilo 2011

REVUO DE ESPERANTO NEDERLANDO

FEN^{ESPERANTO NEDERLAND}X

Forumo de Esperanto Nederland

www.esperanto-nederland.nl

Dumonata membrogazeto de *Esperanto Nederland*.
ISSN 1384-6515

Membroj de *Esperanto Nederland* ricevas la gazeton; ĝi estas aparte abonebla nur por ne-membroj en eksterlando. Tarifo EUR 17,50

Por tiuj, kiuj tion bezonas, son-kasedoj kun la enhavo estas haveblaj. Informojn donas la sekretario.

Redakcio: <redakcio@esperanto-nederland.nl>
H. Bakker, Kastelenstraat 231II, 1082 EG Amsterdam,
tel./fakso 020-64 21 853 <hansbakker@raketnet.nl>.

J.K. Hammer, Taxusstraat 7, 1505 AA Zaandam,
tel. 075-616 69 31, <ko.hammer@kpnmail.nl>.

Esperanto Publike:

Gazetartikoloj ktp estas bonvenaj ĉe redaktoro Hans Bakker, same kiel informoj pri mencioj de Esperanto en radio kaj televido. Bonv. indiki detalojn.

Lingva rubriko:

Emiel Van Damme, Albert 1 straat 44,
BE 1703, Schepdaal, Belgio.

Teknika redaktoro:

Julia De Coster, Esperanto-Centro Antverpeno.

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.

ESPERANTO NEDERLAND

Prezidanto

Gerrit Berveling, Kalverstraat 8-B, 8011 LH Zwolle.

Tel.: 038-4237003

Retadreso: <gerrit.en.madzy@planet.nl>.

Sekretario

PROVIZORE vi uzu la adreson de Ineke Emmelkamp,
Arubastraat 12, 9715 RW Groningen. Tel.: 050-57 18 842.
Retadreso: <info@esperanto-info.nl>.

Membro-Administranto:

Remment Balk, Egeïschestraat 42,
8303 EN Emmeloord. Tel. 0527-23 93 78 //
<membroj@esperanto-nederland.nl>.

Kasisto:

Wald ten Hagen, Postbus 94, 3860 AB Nijkerk.,
<kasisto@esperanto-nederland.nl>.

Bankkonto: 78 68 44 167 nome de ESPERANTO
NEDERLAND, Nijkerk; **UEA-konto:** esne-h

Informado/informmaterialo: Ineke Emmelkamp,
Arubastraat 12, 9715 RW Groningen. Tel. kaj fakso:
050-57 18 842. Retadreso: <info@esperanto-info.nl>.

Instrua Servo: Luit Staghouver, Julianalaan 25, 9781 ED
Bedum. Tel. 050-301 40 15, <luitstaghouver@home.nl>.

Studie-weekeinde:

<studsemajnfino@esperanto-nederland.nl> aŭ Marijke
Lathouwers, Kruiszwijn 1205, 1788 LE Den Helder,
Tel: 0223-643781.

ENHAVO

- 2 Ne nur Fen-X.
- 3 Invito al la 20-a Ĝenerala kunveno / Protokolo de la 19-a Ĝenerala kunveno.
- 6 Diskuto-Discussie over de Toekomst van ESPERANTO-NEDERLAND.
- X Lingva rubriko.
- 9 Mesaĝo de la kasisto / Bericht van de penning-meester / Vivtenu vian Asocion! / Kiel mi esperantistiĝis / Studo-semajfino en marto.
- 10 Esperanto Publike / Nederlanda Esperanto-Kongreso en Münster.
- 11 Zamenhoftago en Hago / Nekrologo Johan Poptie. / NGGE / 96-a Universala Kongreso; Karavano / UEA: Malferma tago.
- 12 Heidi Goes: Esperanto en Indonezio.
- 13 Ekspozicio Alise Medina / Libera Penso.
- 14 Recenzo: Kiel Vaglumo / Instituto Zamenhof, Togolando / Caro Petro en Nederlando.
- 15 Skolta Esperanto Ligo reaktiviĝas / Pola Radio / Tute Natura.

ĈE PAĜO 1.

Bildo el 1850 de la centro de Münster, kie okazos la Nederlanda Esperanto-kongreso. Vidu paĝon 10.

DE LA REDAKCIO.

Grava numero, kun invito kaj tagordo por la 20-a ĝenerala kunveno, la 28-an de majo en Utrecht, protokolo pri la 19-a en 2010.

Cetere urĝaj komunikoj de la kasisto kaj de la prezidanto en paĝo 9. Nepre donu al ili vian atenton!

Dankon al la multaj membroj kiuj helpis min.

Ko Hammer.

NE NUR FEN-X

prizorgas la rilaton inter la asocio kaj ĝiaj membroj.

Por tio zorgas ankaŭ la retpaĝoj, kiujn lertaj kaj aktivaj redaktoroj prizorgas.

Raportoj pri kunvenoj, kaj belaj bildoj tie estas troveblaj. Pri estontaj aranĝoj tie troviĝas informoj kaj aliĝiloj. Ofte la informoj estas pli vastaj ol en la revuo, ĉar - dum papero havas fiksjajn limojn - la elektrona spaco estas preskaŭ senlima.

Do: se tio estas ebla por vi, regule vizitu la retpaĝojn ĉe <www.esperanto-nederland.nl>.

KONTAKTO

La dumonata socikultura revuo de TEJO nun havas redaktoron en Brazilo, Rogener Pavinski, kiu ĉiam sukcesas fari el ĝi tre valoran revuon, kiu mirige plaĉe aspektas, kaj enhavas multajn bonegajn artikolojn. Tio danke al vasta grupo de konstantaj kunlaborantoj.

Krom papere, ankaŭ voĉlegita eldono estas havebla, senpage, kontraŭ ensendo de 60-minuta kasedo. Ankaŭ kontakto per radio estas ebla.

Do vere temas pri altnivela, bonkvalita eldono de TEJO kaj UEA.

La abontarifo varias laŭlande. Por Nederlando ĝi estas EUR 23,-.

DATOLIMO:

Materiale por la venonta numero estas bonvena ĝis la fino de marto. Sendu ĝin kiel eble plej frue, tiam vi ege helpas nin.

INVITO
POR LA 20-A ĜENERALA KUNVENO DE ESPERANTO NEDERLAND,
OKAZONTA LA 28-AN DE MAJO 2011

de 10.00 h ĝis 14.00 h
en "Vergadercentrum Vredenburg", Vredenburg 19, 3511 BB Utrecht.

Membro povas reprezenti maksimume 2 aliajn membrojn,
se li/ŝi transdonis subskribitajn mandatojn al la registranto ĉe la komenco de la kunveno.

TAGORDO

00. Alveno ekde 10.00 h.

01. Malfermo de la ĝenerala kunveno
10.30 h.

Rememoro de la forpasintaj membroj.
Nomumado de voĉdonkomisiono (du personoj).

02. Fikso de la Tagordo / Envenintaĵoj.

03. Protokolo pri la 19-a ĝenerala kunveno
en 2010.

04. Agadraporto pri 2010.

05. Financaj raportoj pri 2010.

- 5.1. Raporto de la kaskontrol-komisiono.
- 5.2. Rezultkonto pri 2010
- 5.3. Bilanco je 31-12-2010.

06. Proponoj

- 6.1. Propono de la estraro: fikso de la kotizoj por 2011. La estraro proponas ne sanĝi la kotizojn.
- 6.2. Buĝeto kaj Laborplano 2011
- 6.3. Katedro Interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo (UvA).

La kontrakto pri speciala katedro pri interlingvistiko kaj Esperanto ĉe UvA finiĝos en 2013. La estraro proponas al la membraro ke la asocio principe deklaru sin preta daŭrigi financadon de la katedro ankaŭ post 2013. Tiukaze konkreta propono (inkluzive de detaloj pri nova kontrakto kaj nomo de la nomumota kandidato) estos prezentita al la membroj antaŭ la jarkunveno de 2012.

07. Elektaj.

7.1. Estraro:

La estraro urĝe alvokas membrojn proponi kandidatojn aŭ mem kandidatiĝi por estrara posteno. Daŭre vakas la sekretaria posteno kaj la prezidanto jam nun deziras anonci ke li intencas demisii post du jaroj.

7.2. Laŭstatute la tuta kaskontrola komisiono ĉiujare demisias.

Arjen-Sjoerd de Vries demisias kaj ne estas reelektebla. Derk Ederveen, Jeannette Bosse-Sibbel, Peter den Breems kaj Bert Engels estas elekteblaj kiel anoj de la kaskontrol-komisiono.

7.3. Arbitracia komisiono: Marc van Oostendorp demisias, sed estas reelektebla.

La aliaj membroj estas Ko Hammer (ĝis 2013) kaj Anneke Schouten-Buijs (ĝis 2013).

08. Jubileantoj

Jubileantoj (50-jara membreco) ĉijare.
Ni mencias la membrojn kiuj antaŭ 25 jaroj aliĝis.

09. Verloren van Themaat-premio.

La ĵurio anoncas la rezulton.

10. Ronddemandado.

11. Fermo

Groningen, la 3-an de februaro 2011.
La estraro de ESPERANTO NEDERLAND.

Lunĉpaŭzo: Dum la paŭzo funkcias la UEA-Libroservo.
Posttagmeza programo:
Detaloj aperos en la venonta FEN-X.

PROTOKOLO

de la 19-a ĝenerala kunveno de ESPERANTO NEDERLAND, okazinta la 29-an de majo 2010 en "Vergadercentrum Vredenburg", Utrecht.

00. Akcepto

Pri la akcepto respondecis Ans Bakker-ten Hagen. Alvenis 45 partoprenantoj, kiuj kunportis 16 mandatojn. Do, entute ĉeestis 61 voĉoj.

01. Malfermo.

Je la 10.30h la prezidanto de ESPERANTO NEDERLAND, Gerrit Berveling, malfermis la kunvenon. Li

prezentis sin kaj deziris al ĉiuj bonan kunvenon. Li parolis iom pri la pasinta jaro. Li ne konsideras sin kunsidada «tigro». Li volas iom retrorigardi. Multaj homoj faris multon por Esperanto. Ni ne nur ekzistas por babili, sed ankaŭ por agi. Ekzemple: sinjorino Hoobroeckx faris multan laboron por la Zamenhofstrato-projekto. Li gratulas al Ionel Onet, kiu havas naskiĝtagon. Poste li reklamis pri si mem: li eldonis lastjare 5 librojn. Poste li alvokis ke ni ankaŭ pripensu la kompatindajn eldonistojn: eldoni kostas multan monon, do, se vi certe aĉetas minimume unu libron jare, vi subtenas la lingvon mem.

Momento da silento estis por niaj mortintaj membroj, nome: s-ino J.G. van Hulst, s-ro C.M. Bakum, s-ro G.J. Sommeling, s-ro F.H. Kat, S-ino A.J. Middelkoop, s-ino

A. Wester-van der Veen, s-ro H.F. Menges, s-ro R.P.E. Koopmans kaj s-ro J. Pranger.

02. Fikso de la Tagordo / Envenintaĵoj.

La tagordo estas fiksata sen aldonadoj.

1. Dek ses Membroj mesaĝis, ke ili ne povas partopreni la kunvenon.

2. La prezidanto nomumas Pieter Engwirda kaj Marijke Lathouwers kiel voĉdonkomisionon.

03. Protokolo pri la 18-a ĝenerala kunveno en 2009.

04. Hans Erasmus demandas pri poŝtmarkoj. Ili estas ĉe Els ten Hagen.

Kun danko al la protokolinto, Alfons Pijnacker, la protokolo estas akceptita.

04. Agadraporto pri 2009.

-- Marijke Lathouwers el Den Helder. En la 6-a punkto mankas la ĥoro Malvo. Estas 20 membroj; oni ekzercas en Alkmara lernejo, pro la kresko de la ĥoro. Ineke Emmelkamp konstatas, ke la sekretario de Alkmaar mem forgesis; Ineke Emmelkamp mem nenion aldonas.

-- Rob Moerbeek petas trakti ĝin laŭpunkte. Li demandas, ĉu la kasisto metis monon ĉe ASN-banko. Kian konton oni elektis. La kasistino ne scias parkere.

-- Mabe-soone-fonduso. Rob Moerbeek demandas el kiu fonduso la Mabe-soone-fonduso ricevis sian monon. Ĝi ricevas monon el la ĝenerala budĝeto.

-- Kees Ruig demandas pri kategorioj de aĝo; laŭ li ili ne estas tre logikaj. Ineke Emmelkamp simple prenis la ciferojn, sed mencias ilin pli poste laŭ alia kalkulo. Ŝi kalkulas laŭ 10 aŭ 20 jaroj. Estonte estos laŭ ĉiu deko.

-- Rob Moerbeek: ĉu la tri kandidatoj vere iĝis estraranoj? Unu el ili regule protokolas, la dua faras aliajn aferojn, la tria estas Gerrit Berveling.

-- Rob Moerbeek demandas ĉu Internationaal Instituut voor Sociale Geschiedenis (IISG) estas alirebla: La respondo estas ke ĝi estas libere alirebla por ĉiuj, ankaŭ ne-esperantistoj. Estas arĥivoj kaj tiuj estas libere alireblaj.

-- Artikoloj kiuj aperas en iu ajn gazeto estas ankaŭ interesaj por biblioteko Hodler. Se oni volas, bonvolu plusendi al s-ro Hans Bakker; almenaŭ kontaktu lin.

-- Rob Moerbeek: Ineke Emmelkamp mencias ion pri Ŝlosilo. Kio okazis? Ineke aldonas, ke temas pri nova kvanto, ne pri nova eldono. Ekzistas ankoraŭ 100 aŭ 200 malnovaj. La eraroj estas ne tiel gravaj, ke oni devas anstataŭigi ilin.

-- Kees Ruig demandas kun kiu celo oni forsendis 1000 leterojn al loĝantoj de iu Zamenhofstrato ktp. Ineke Emmelkamp respondas ke ĝi okazis pro la Zamenhof-jaro. Ineke ankaŭ sendis bultenojn al loka gazetaro, kelkfoje ĵurnalistoj verkis artikolon por gazeto. Koston kaj rezultojn ktp oni nur scias pli poste.

-- Alfons Pijnacker petas, ke oni ŝanĝu la sumon je punkto 4.2.4.: devas esti 1985. Estas eraro de Els ten Hagen, kiu pardonpetas.

-- Gerrit Berveling rimarkas, ke Fenikso bone funkcias en la nuntempa periodo.

-- Rob Moerbeek demandas pri Nuntempe aŭ Bij de tijd.

Ineke Emmelkamp kaj Joke Hoobroeckx traktas faktojn okaze de iu evento. Ĝi ne regule aperas, sed estas aktualigata laŭ bezono.

-- Rudi Koot diras, ke ĉe la Sekcio Rotterdam lia nomo estas menciita kiel unu el la du ĉeestantoj deflanke de la klubo Merkurio en la UK en Pollando. Li ne estis tie, do forstreu la nomon.

-- Pieter Engwirda havas du rimarkojn: la klubo Nijmegen organizis nederlandlingvan vesperon pri Zamenhof. Kees Ruig organizis ĝin; oni forgesis menciigi ĝin en la raporto. Por la klubo oni organizis en Groesbeek kurson kun Kees Ruig. En la kurso estas 12 partoprenantoj. Sekvontjare oni aldonu ion pri Groesbeek; tiam Pieter Engwirda povas mem doni informojn tie.

-- Rob Moerbeek tre aprezas la rimarkojn pri s-ino Middelkoop, kvankam nekrologo ne estas kutima en agadraporto.

-- Ans Bakker legis la jarraporton kun granda admiro. La estraro estas malgranda, kaj tamen multo estas farita.

La agadraporto estas akceptata.

Ĉeestas gasto el Bulgario, kiu salutas nin nome de la bulgara Esperanto-asocio. Antaŭ 20 jaroj tiulande estis 6000 esperantistoj, nun nur 400. EU malfermas la pordojn, kaj pro tio multaj homoj forlasis la landon por perlabori monon aliloke.

05. Financaj raportoj pri 2009.

5.1. Raporto de la kaskontrol-komisiono.

Gerrit Berveling donas la parolon al Els ten Hagen, kiu transdonas ĝin al Arjen-Sjoerd de Vries. Peter den Breems kaj li kontrolis la kason kaj konstatis, ke ĝi estas en bona stato. Ili proponas malŝarĝi la kasistinojn.

5.2. Rezultkonto pri 2009.

Peter den Breems tamen havas diversajn demandojn. Unue li sin demandas ĉu en la rezultkonto estas granda perdo, pro perdo en la investado. Tio jam estas multjara afero. Akcioj estas posedaĵoj, kiuj apartenas al la bilanco. Tiun perdon oni devas meti sur la bilanco. Tio antaŭe estis, ĉar la akcioj estas venditaj kaj nun estas sur la rezultkonto. Estas metodo de librotenado. Fakte ni ankaŭ kontribuas por la katedro. Tio estas en la bilanco. Ĉar nun estas tiom da malprofito, Els ten Hagen forprenis el alia konto la 5 mil pro la katedro.

5.3. Bilanco je 31-12-2009.

La kasistino rimarkigas, ke nun ni ne plu havas akciojn. La sumon por la katedro la kasistino prenis el la rezerva kapitalo. Peter den Breems pensis ke estas fonduso por katedro. La mono de la katedro estas el fonduso por instruado.

La kunveno akceptas la raportojn kun danko. La prezidanto konstatas, ke oni faris multe da laboro kaj dankas pro tio.

06. Proponoj

6.1. Propono de la estraro: fikso de la kotizoj por 2011.

La estraro proponas ŝanĝi la kotizojn:

- membro ordinara EUR 30 (nun 27,50), samhejmano ordinara EUR 10,-- (nun EUR 8,00); akceptata. La lasta ŝanĝo okazis en 2006.

- junuloj ĝis 30-jaraj EUR 15,00 (nun EUR 13,75), samhejmano de junuloj EUR 5,00 (nun EUR 4,--);

- subtenanto EUR 10,00 minimume; ne ŝanĝiĝas.

- aparta eksterlanda abonkotizo EUR 17,50
(nun EUR 15,--)

Ĉiuj proponoj estas akceptataj.

6.2. Buĝeto kaj Laborplano 2010.

Peter den Breems havas demandon. Li konstatas eraron ĉe la elspezoj. La fina sumo estas indikita 22 500, kaj li kalkulis 23 750,--. La kasistino rekalkulos poste kaj informos la kunvenon. La defcito estas 8 650,--. Ni simple akceptu la ciferojn kaj ŝanĝu ilin. Estas granda diferenco kun la ciferoj en la rezultkonto. Estas metitaj sumoj en la fondusojn, do oni ne bone povas kompari.

07. Elektaj.

7.1. Estraro:

La kasisto Els ten Hagen demisias kaj ne estas reelektebla.

La estraro prezentas la kandidaton Wald ten Hagen kiel kasiston. Unue Wald ten Hagen prezentas sin. Li estas 44-jara kaj instruisto bazlerneja. Antaŭe li estis en entreprena aktivado. Li esperas esti nia kasisto la venontajn jarojn. Oni aklame bonvenigas lin, sen skriba voĉdonado. Alfons Pijnacker petas librotendon tiamaniere, ke li povos kompari la rezultkonton kun la budĝeto.

7.2. Kaskontrol-komisiono:

Laŭstatute la tuta komisiono ĉiujare demisias. Elekteblaj estas: Peter den Breems, Arjen-Sjoerd de Vries kaj kiel anstataŭanto Jeannette Bosse. Denove oni aplaŭde nomumas ilin.

7.3. Arbitracia komisiono:

Ko Hammer kaj Anneke Schouten-Buijs demisias. Ili estas reelekteblaj. Same aklame oni ilin nomumas. Gerrit Berveling korege dankas Els ten Hagen pro la vere entuziasma agado kiel kasistino. La estraro petas al Wald ten Hagen kolekti kelkajn donacojn. Gerrit nun transdonas la donacojn. Ankaŭ Ineke Emmelkamp kore dankas ŝin. Els ten Hagen estis dum 7 jaroj kasistino.

08. Jubileantoj

Ne estas jubileantoj (50-jara membreco) ĉi-jare. Ni mencias la membrojn kiuj antaŭ 25 jaroj aliĝis. Temas pri T. Geertsema, Roel Haveman, s-ino M. van der Molen, s-ino E. de Morree, s-ino P. Reddingius.

09. Verloren van Themaat-premio.

La ĵurio anoncas la rezulton. Pri la premio parolis s-ino Kitty Balk. La ĵurio donas la premion al Douwe Beerda, prezidanto de NEJ. Li aperigis artikolojn en gazetoj kaj interreto. Douwe Beerda ne ĉeestas. Ineke Emmelkamp invitos lin por la estonta estrarkunveno, por transdoni la diplomon kaj diskuti la estontecon de NEJ kaj ESPERANTO NEDERLAND.

10. Konkurso pri Esperanto-nomoj en ne-Esperanto-medio

La estraro anoncas la rezulton. La estraro ricevis multajn reagojn, kiujn oni en estrarkunsido rigardis kaj komparis. Ineke Emmelkamp prezentas tiun punkton. Unu membrino eĉ sendis 523 fotojn, ankaŭ en' kaj el', same kiel "Vero moda". Estis multaj nomoj de aŭtomobiloj kaj ŝipoj: Benita, Donato, Ino, Vento. Fakte estis nur unu premio, sed la estraro decidis fari ŝanĝon: du unuajn premiojn kaj unu duan premion. Ralph Schmeits kaj Joke Hoobroeckx ambaŭ ricevas la unuan premion. Ralph sendis foton

de aŭtobuso kun la haltejo 'Mia Domo'. Kiu nomo estas sur kvartala domo en Brabant vilaĝo.

La alia unua premio estas por Joke Hoobroeckx kiu sendis foton de strato 'Kie'. Ĝi estas sakstrato en vilaĝeto en Frislando. Ralph kaj Joke ricevas duonon de la promesita monsumo kaj la libron "La Transilvania Nupto" de Stephan Lang en traduko de la prezidanto.

La dua premio estis por Hans Schutijser, kiu sendis broŝuron de ĝardenmeblaro kun Esperanto-bestonomoj. La ricevis la saman libron kaj la novan diskon de Kapriol'. Ĝis la lasta momento alvenis fotoj, eĉ dum la kunveno! Nun la konkurso estas finita.

11. Ronddemandado.

Bert de Wit mencias ke li ricevas informojn pri eblo uzi Esperanton kiel ilon por socia kohero. Okazos en Harlemono. Temas pri eksterlandaj virinoj.

Pieter Engwirda prezentas jenon: Douwe Beerda proponas Eŭropan ĝemelurbon; Pieter proponas priserĉi nederlandan urbon kiu povas figuri kiel tia urbo: devas esti en ambaŭ urboj aŭ Esperanto-klubo aŭ pluraj esperantistoj. Li serĉas iun, kiu volas ekaktivi kune kun li.

NGGE: fakte Simon Smits intencis kunporti informojn pri NGGE, sed li ne ĉeestas. Prefere ĉiuj geinstruistoj estu membro de NGGE. NGGE volus pli intime kunlabori kun ESPERANTO NEDERLAND; estus bone se iu nome de NGGE ĉeestus la estrarkunsidojn de ESPERANTO NEDERLAND.

Ans Bakker atentigas pri la paperoj, kiujn oni ricevis ĉe la eniro. Ŝi parolas pri la ludo "Naakte waarheid", kiun oni ludos en sekva Amsterdamo kunveno. Ĉiuj estas invititaj. Ili okazas ĉiam la duan dimanĉon de la monato.

Wil van Ganswijk ricevis informon de iu sinjorino el Noord-Brabant; tiu gvidas klubon por tre inteligentaj infanoj, kaj ŝi serĉas iun kiu kapablas instrui tiajn infanojn. Ineke Emmelkamp demandas sin, ĉu temas pri la sama grupo al kiu Douwe Beerda instruas: infanoj 12-jaraj. Wil van Ganswijk mem havas 2 novajn gelnantojn: onklinon kun ŝia 11-jara nevo.

Ineke Emmelkamp mencias, ke en 2011 estos denove komuna kongreso en Münster. Membroj de ESPERANTO NEDERLAND kaj GEA ricevos iom da rabato. Rudi Koot demandas, ĉu nederlandanoj rekte aliĝu al GEA. Jes, tio estas preferinda.

Loes Demmendaal disdonas la novan faldfolion de UEA, por varbi eventuale novajn membrojn. Estas ebleco de favorepreza aliĝo / "tientjes-lid".

Ko Hammer esperas, ke oni sendu artikolojn por Fenikso; la ĵurioraporton de la Verloren van Themaat-premio, la fotojn de la konkurso li ankaŭ deziras ricevi. Bonvolu sendi simplan tekston, kaj ne HTML, kolorojn ktp. En tiu kazo, li devas forigi ĉiujn kodojn ktp. Cetere li deziras danki la "grandegan" estraron pro la granda laboro, kiun ili faris. Gerrit Berveling mencias denove, ke oni ankoraŭ ne trovis ĉefdelegiton; li mem do faros la laboron.

Li fermis la kunvenon; la lunĉpaŭzo daŭris ĝis la 13-a horo. Dum la paŭzo funkciis la UEA-Libroservo.

En la membrokunveno de 2009 ni decidis ke komisiono el kelkaj membroj pripensos la Estontecon de ESPERANTO NEDERLAND. La diskuto pri tiu ĉi grava punkto okazos en la Nederlanda lingvo.

12. Diskuto/discussie: Toekomst van ESPERANTO NEDERLAND

De discussie over dit onderwerp zou in het Nederlands worden gehouden en werd op verzoek van het bestuur geleid door Hiddo Velsink. Na 15:00 uur wordt er nabesproken met thee met iets erbij.

Eerst reageert het bestuur, dan drie leden van de commissie, dan discussie.

Gerrit Baveling licht een en ander toe. Commissie over de toekomst van Esperanto in Nederland. Een van de redenen was, dat het aantal leden afneemt. Andere reden, dat er weinig mensen zijn, die bestuurstaken op zich willen nemen om de boel overleidend te houden. De commissie is met een rapport gekomen. De commissie krijgt het woord, daarna reageert het bestuur.

Hans Erasmus krijgt het woord: Hans Erasmus, Kees Ruig, Rudi Koot, Ans Bakker, Joke Hoobroeckx en Wim Jansen vormden de commissie. Er is twee keer vergaderd. Kern is belangrijker dan het middel. Optimale mondiale communicatie met behoud van eigen identiteit. We zijn teveel bezig met onszelf en treden te weinig naar buiten. We gaan voorbij aan de wezenlijke zaken. Verslag van een ledenvergadering komt niet naar buiten. Nederlands spreken ter vergadering, praten over het taalprobleem. Misschien tot één club komen met de Vlamingen, maar ook Stichting Nederlands etc. Is de geweldige verengelsing goed? Nee, dat vindt de commissie niet. Voorstel tot een nieuwe vereniging met nieuwe statuten. Esperanto is dan een van de middelen; het is onzin dat de commissie Esperanto kapot wil maken of dat de vereniging moet worden opgeheven.

Wim Jansen wil ingaan op de bestuursinterpretatie van een aantal voorstellen. Wil nogmaals benadrukken, dat het nodig was om ook de statuten al concreet aan te passen en niet alleen maar wat ideeetjes te lanceren. Niets revolutionairs dus. Bestuur vindt formulering vaag en hoog gegrepen; Wim Jansen is het daarmee niet eens. Het gaat om het aloude talenprobleem, weliswaar iets anders dan in 1887, maar het is hetzelfde probleem. In de statuten moet het kort. In Nederland horen wij elkaars identiteit te respecteren en te beschermen. Het gaat ook niet om het opheffen van Nederland of het opgaan van Nederland in Europa. We worden allemaal een beetje wereldburger, de grenzen zijn open en die ontwikkeling is niet tegen te houden. Als we naar Esperanto kijken, kunnen we daar veel uit putten. Esperanto dient daartoe, andere talen, zoals het Engels, hebben dat doel niet. Esperanto wordt niet meer genoemd, want de taal is een middel en geen doel. De commissie heeft samenwerking met UEA en SAT niet meer genoemd; beide horen wel bij de niet met name genoemde organisaties. Als we de nieuwe statuten zouden aannemen, dan moeten ze wel door UEA getoetst worden. Organisatie van 300 leden kan best gerund worden door een bestuur van 3 leden. Dat is een heel praktische zaak. Het bestuur kan zich richten op de kerntaken en een aantal zaken kan worden uitbesteed. Projecten enzo blijven genoemd worden, maar worden even werkgroepen genoemd, maar het kunnen ook afdelingen zijn, of wat dan ook. Meer eenheden onder de vereniging kunnen er ook zijn. Een nieu-

we lokale afdeling hoeft zich niet meer aan te melden bij het bestuur om zich aan te sluiten; elk groepje mag zich melden, de drempel wordt lager. Dat kan dus allemaal zonder statuten, dus ook bij een ad hoc activiteit. Na een aantal maanden kan men zich ook weer opheffen. (Voorbeeld: nederlandismen in Esperanto: ga gewoon turven). ESPERANTO NEDERLAND wordt niet opgeheven, geen nieuwe vereniging opgericht: klinkklare onzin, verder niet op ingaan. Je hoeft niet te vermelden, dat je niet in strijd met de wet mag handelen of met de rechten van de mens. Geen hangijzer (of breekpunt). De voorzitter van de commissie meent, dat een en ander wellicht niet goed geïnterpreteerd is door het bestuur.

Als derde commissielid Kees Ruig. Hij wil ons even inschakelen. Noem wat trefwoorden: Waarom hebt u Esperanto geleerd? De leden antwoorden: Contact, reizen, verbodering, verzustering, democratie, taal, nieuwsgierigheid, tijd- en geldbesparing, logica, intelligente taal, gezelligheid, lezen, toevalligheid, internationalisme en socialisme, hersengymnastiek, wereldvrede, idealisme, schoonheid, esthetiek, enthousiasme van esperantisten, exotisme, lesgeven, gemak. Dr Liza Semkort heeft een taal ontwikkeld: Provokita, in het Koreaanse alfabet, dat het meest perfecte alfabet is. Es problem vor sprokproblem es solvita. Wie wil dat leren, als dat echt een betere taal is? Ongeveer 15. Wie wil het absoluut niet leren? 6. Wie heeft er nog geen idee over? Marijke Lathouwers heeft ook het idee, dat er een 100-jarige cultuur wordt weggegooid. (Het was uiteraard nep: Liza Semkort = dr L. Zamenhof). Kees Ruig heeft geen conclusie getrokken.

De reactie van het bestuur staat op papier en daarvan heeft iedereen kennis kunnen nemen. Er wordt gevraagd, of we het hebben over de toekomst van ESPERANTO NEDERLAND; de mening van Gerrit Baveling is dat we gaan spreken over wat doen we met Esperanto in Nederland. De opdracht was de toekomst van ESPERANTO NEDERLAND.

Rob Moerbeek vond de vondst van Kees Ruig erg leuk. Als het theoretisch mogelijk zou zijn, zou hij het willen leren, maar volgens Zamenhof was het al bijna onmogelijk. Volgens hem kun je het woord Esperanto niet weglaten, ook al niet, omdat de Unesco het heeft geaccepteerd, dankzij het werk van Lapenna. Als je de term weggooit, gooi je je eigen identiteit weg en daar kun je niet zomaar van afstappen.

Bert de Wit heeft de doelstellingen gelezen. Hij werd getroffen door het defensieve in de doelstellingen. Interculturele identiteit: dat hebben de meesten al, wat moet daaraan veranderd? Daarvoor heb je juist Esperanto, daar kun je dingen mee doen, die je niet met andere talen kunt doen.

Alfons Pijnacker betwijfelt of je meer actieve leden krijgt door de doelstellingen te veranderen. Ook zet Wim Jansen de wereld op zijn kop: we zijn lid van UEA en blijven dat en hoeven dus niet met nieuwe statuten naar UEA.

Gerrit Baveling vraagt zich af, over welke identiteit het gaat.

Kees Ruig wil Rob Moerbeek geruststellen. Hij wil een andere naam, zoals we ook Goethe Instituut hebben,

Dante Alighieri, Erasmus etc. Esperanto roept vaak een vooroordeel op, dus dat moet niet teveel gebruikt: Zamenhofvereniging is beter. De commissie heeft gewerkt volgens de resolutie van Gotenburg.

Madzy van der Kooij vraagt wat die resolutie van Gotenburg is. Die spreekt over een symbiose tussen natuurlijke taal en Esperanto. Dat heeft weinig te maken met statuten aanpassen.

Hans Erasmus reageert op de term defensief. Niet focussen op Esperanto, het is slechts een middel, nooit een doel. Het onderliggende probleem is de algemene verengelsing en het taalprobleem. Het lijkt volgens de zaal erom te gaan, dat iedereen zijn eigen identiteit mag behouden, maar de Esperanto-identiteit niet. Gerrit Berveling reageert: of er nu 3 of 5 bestuursleden zijn, dat maakt niets uit. De term Esperanto vervang je dan door Zamenhofvereniging. Krijg je er dan opeens veel anderen erbij? Gerrit Berveling maakt de vergelijking met de overgang van V.P.R.O. naar vpro: die verschillen enorm van elkaar!

Naam op verzoek verwijderd

vindt dat ze nog niet vloeiend en foutloos Esperanto spreekt. Ze vindt het een mooie taal, die ze graag wil leren. Het is moeilijk het te leren verstaan, omdat er zo weinig gelegenheden zijn om het te horen. Als er op gelegenheden als deze geen Esperanto meer wordt gesproken, wordt het voor beginners wel erg moeilijk om te leren. Het verbaast haar ook, dat je het woord zou moeten vermijden. Esperanto trok haar juist aan. De nieuwe statuten zijn vaag: wat zouden ze willen doen? Dat een jurist ernaar gekeken heeft, betekent niet automatisch dat het goed is. Zij heeft ook een jurist geraadpleegd, die ook constateerde, dat het gewoon om een nieuwe club gaat; dat mag natuurlijk wel, maar het is wat anders dan de toekomst van ESPERANTO NEDERLAND. Ze vindt het wel goed, dat over een aantal zaken wordt nagedacht. Ze herkent wel iets van het naarbinnengerichte. Het moet ook komen van mensen die erbij willen. Bij verwante organisaties denkt ze vnl. aan Esperanto-gerichte organisaties. Daarbuiten kijken kan natuurlijk nooit kwaad. Ad hoc werkgroepen zijn prima. Kan gewoon toegevoegd aan de bestaande afdelingen of werkgroepen. Of je doet het gewoon, zoals zij het spel "Naakte Waarheid" vertaald heeft, zonder naar het bestuur te gaan of naar een afdeling. Ze heeft Rob Moerbeek benaderd. Binnen de Esperantowereld zijn er altijd heel veel mensen, die bereid zijn je te helpen.

Volgens de voorzitter gaat het om de kern: wat is de essentie van waar wij mee bezig zijn? Vlg. Hans Erasmus internationale communicatie. Discussie: hielden we ons niet altijd al bezig met internationale communicatie? Alfons Pijnacker: op het bord staat, waar wij ons mee bezighouden. Daartoe gebruiken we Esperanto en hebben we het dus over internationale communicatie.

Gerrit Berveling vertelt, dat hij op zijn school merkt, dat internationalisering betekent, dat leerlingen uit allerlei landen elkaar in het Engels benaderen en dat andere talen opzij worden gewoven. Vraag die daar uit voortkomt: is het denkbaar, dat wij als vereniging bezig zijn met verbetering van internationale communicatie en dat we dat doen zonder Esperanto? De vergadering vindt van niet. Staat in de statuten, zonder het woord Esperanto te noemen. Als Esperantovereniging zouden we bindmiddel kunnen zijn tussen taalvereniging van b.v. Denemarken, Litouwen in Brussel. Kees Ruig vindt, dat het woord eventueel wel kan worden gehandhaafd. Als je het bindmiddel wilt zijn, en je gebruikt het Esperanto als middel, dan is het logisch dat ook in je naam te vermelden.

Ko Hammer kiest niet voor een persoon, Zamenhof, maar voor een taal als middel voor communicatie. Hij is protestant, maar geen calvinist, want dan krijg je van alles erbij. De astmavereniging bouw je ook niet om tot een vereniging ter bevordering van de algemene gezondheid. Hij kiest voor Esperanto en dat wil hij niet verbloemen!

Piet Damman: als je de naam Zamenhof gebruikt en je zou erin slagen met anderen te gaan samenwerken, dan komt toch de aap uit de mouw. Helderheid vooraf lijkt dus beter.

Velsink stelt de vraag: als je de aanpassingen overneemt, krijg je dan meer actieve leden en bestuursleden? Kees Bos vindt dat een belangrijk punt: wat was nu eigenlijk het probleem. Werkgroep stelt voor naar de toekomst te gaan en het verleden te vergeten. Volgens hem speelt dit probleem niet alleen bij ESPERANTO NEDERLAND, maar bij allerlei verenigingen. Verder kun je aan de hand van het aantal leden nog geen uitspraken doen over Esperanto in Nederland. Er zijn ook mensen actief via internet.

Hans Bakker kent ook mensen, die lid worden van een organisatie, niet om de doelstelling, maar omdat er iets anders is dat trekt. Zo gaan velen naar het UK om oude vrienden te ontmoeten.

Ans Heijstra: Het KVG (Katholiek Vrouwemgilde) heeft 95 jaar bestaan en is nu ook ter ziele.

Bert de Wit vindt het van belang na te gaan, wat er speelt in de maatschappij. Hoe kun je van iets gebruik maken. Dat denken had aan het rapport vooraf moeten gaan.

Peter den Breems heeft moeite met de discussie. Hij heeft veel internationale contacten via Esperanto. Als het Esperanto daaruit verdwijnt, zou hij wellicht vertrekken.

Luit Staghout zou ook vertrekken, evenals Ko Hammer, evenals een aantal anderen.

Ans Heijstra meent, dat wijzigingen altijd leden kosten: je wijzigt iets, en er gaan mensen weg, en er komt maar heel weinig bij. Brussel heeft voorkeur voor Engels, Nederlands mag zelfs niet.

Hans Erasmus vindt, dat een aantal wat doorslaan, alsof Esperanto helemaal zou wegvallen.

Anneke Buijs: tri kialoj: multaj homoj jam faras multajn aferojn. Inoj devas labori. La socio multe ŝanĝiĝis la lastan tempon; kiam ŝi estis 30-jara, estis pli facile ol por la nunaj 30-jarulinaj.

Ruth Richardson: een mens kiest zelf. Zij is kind van



**Ruth
Richardson**

Surinaamse ouders. Ze spreekt Nederlands vanaf haar jeugd. Toen Suriname onafhankelijk werd, kon ze kiezen voor de Surinaamse nationaliteit, al had ze er nauwelijks gewoond. De mensen hier kiezen voor Esperanto en dat bindt. Als je dat eruit haalt, verlies je toch wel wat. Ergo: Esperanto als emotionele waarde.

Kees Ruig: als we eind 20e eeuw zo

hadden geredeneerd als nu, had ESPERANTO NEDERLAND nooit bestaan, want toen zijn LEEN en FLE gefuseerd. De wereld verandert en we moeten meegaan. Anders krijgt Wim Jansen gelijk: dan gaan we naar 0. De boodschap is duidelijk; we moeten niet bang zijn voor veranderingen.

Rob Moerbeek: meer samenwerken met organisaties, die zich inspannen om het Nederlands te verdedigen. Daar is op zich niets tegen. Wil je daar echt invloed krijgen, dan kun je dat niet als één persoon. De wereldfederalisten hebben bv. Esperanto al geaccepteerd. Hij wil er voor pleiten, dat velen van ons zich inspannen voor de wereldfederalisten en de Nederlandse vereniging voor de VN.

Joke Hoobroeckx zat ook in de commissie; ze kon er niet in meegaan, dat de naam wordt veranderd in Zamenhofvereniging. We hoeven ons niet te schamen voor Esperanto. Toen ze over Esperanto hoorde, was ze meteen enthousiast daarover. Als je mensen duidelijk wilt maken, dat Esperanto deugdelijk is, dan bereik je dat niet door de naam te verdoezelen, in tegendeel zelfs. We bestaan om Esperanto te laten zien, en niet om ESPERANTO NEDERLAND te laten bestaan. Dus: uitdragen en van de daken schreeuwen.

Els van Dijk: in 1967 Esperanto gaan leren. Ze heeft al heel wat golfbewegingen meegemaakt. Er spelen twee dingen; het in stand houden van de vereniging. Het veranderen van statuten verandert dat niet; die moet je alleen maar veranderen, als het écht nodig is. Veranderingen moeten alleen heel geleidelijk; in één klap kan vaak dodelijk zijn. Je moet meteen duidelijk maken, dat je internationale communicatie wilt bevorderen via Esperanto, dat is wel zo eerlijk. De manier waarop is natuurlijk altijd belangrijk. Verder vraagt ze zich af, of die taalverenigingen graag met ons samen willen werken. Weten we daar wel iets over?

Gerda Dercks wil het over een andere boeg gooien. Rob Moerbeek wilde meer contact met andere groepen. Ze geeft momenteel Nederlandse les. Ze praat soms ook over Esperanto; het blijkt dan soms toch redelijk bekend te zijn. Sommigen zijn daardoor ook Esperanto gaan leren.

Samengevat: Doel: internationale communicatie dan wel het middel? Hiddo Velsinks conclusie is, dat op een aantal punten de ideeën niet zóver uit elkaar liggen: aantal bestuursleden, werkgroepen, samenwerken UEA, niet tegen de wet in handelen. De diepere kern is de doelstelling van de vereniging. Het bestuur gaat hiermee naar huis en komt wrs. volgend jaar met een voorstel.

Zijn er nu al ideeën?

Ans Bakker zou de vraag willen stellen aan de aanwezigen: kom naar het bestuur met ideeën over verenigingen en soorten organisaties, die iets kunnen doen. Dan wel zelf uitvoeren, niet het bestuur ermee belasten. Verder schaamt niemand zich voor Esperanto. Het was niet de bedoeling van de werkgroep, dat mensen weg zouden lopen. Als de werkgroep dus iets heeft geproduceerd, dat de vergadering niet begrijpt, dan ligt dat niet aan de vergadering, maar aan de werkgroep! Het is niet het bestuur alleen, waar de toekomst van ESPERANTO NEDERLAND van afhangt. Met velen wordt het werk gedaan.

Joke Hoobroeckx wil meteen een werkgroep vormen, die zich met de contacten naar buiten gaat bezighouden.

Rob Moerbeek stelt voor, dat iemand een inventarisatie maakt van organisaties die zich daarmee bezig houden. Kan via internet. Daarna een keer bij elkaar komen. Dus: plek op internet waar je je kunt inschrijven met je vereniging. Heel concreet: Bert de Wit, Hans Schutijzer en Rob Moerbeek steken de koppen bij elkaar om dit verder uit te werken.

Els van Dijk vindt het toch van belang de doelstelling helder te hebben. Daarop heeft ze al veel goede bedoelingen zien stranden. Die taalclubs willen alleen het bevorderen van de eigen taal, maar er is veel meer. Eenvoudig beginnen: wat kan wel, wat moet er eerst. Zonder bescheiden doelen vergaloppeer je je snel. Eerst één stap zetten, dan vervolgstappen. Wat is de volgende: willen ze wel samenwerken, zo ja, praat daar eens mee; moet je statuten veranderen?

Hiddo Velsink constateert, dat het gevoel is, dat de commissie een te grote stap wilde zetten. Leggen we dat bij het bestuur neer of helpen we daarbij? Het groepje "Rob" kan wel even brainstormen.

Gerrit vindt het idee van Rob cs wel goed, maar wil het niet zelf doen. Als er mensen zijn met dergelijke contacten, laten ze dat dan vooral doen en dat uitdragen. Wijziging van aantal bestuursleden, kan volgende keer hamerstuk zijn. Hij herinnert ook aan het Benelux-congres in Antwerpen, dat weer erg leuk was; week daarna Kaiserslautern en je wordt meteen in het Esperanto begroet. Ook goede bijeenkomst. Op de terrassen zaten ook veel Esperantisten. Dat is mooi, dat moet vooral doorgaan. Een manier van naar buiten treden: een tweetalige kerkdienst in Kaiserslautern, dat trok wel mensen. Volgens Ineke Emmelkamp worden dat soort dingen juist geregeld door verenigingen en dat moet dus gewoon blijven gebeuren.

13. Fermo

Gerrit fermas la kunvenon je la tria horo, dankante la komisionon, kaj Hiddo Velsink, kiu bonege gvidis ĉi tiun parton de la kunveno.

Jen du amuzaj poemoj pri Esperanto-klubo.
 Ĉu vi rekonos trajtojn de via propra klubo?
 Espereble ili memorigos vin pri viaj agrablaj
 sentoj okaze de iamaj kunvenoj!

ART' PRO ARTO Anja Karkiainen

Al ĉiuj gravaj Esperant-kunvenoj
 ja apartenas artaj programeroj¹,
 poemoj, kantoj kaj teatraj scenoj,
 la samaj ĉiam, raras premieroj.
 Okazas sur podio dramprezento.
 La temo gravas. Lerta² grup' aktoras.
 La homoj spektas ĝin dum tutsilento
 aŭ kun la rolfiguroj ridas, ploras.
 Post falo de l' kurteno malavaras
 publiko kiam arde³ ĝi aplaudas.
 Programgvidanto tamen jam ekstaras
 kaj oni lian laŭtan voĉon aŭdas
 "Mi dankas al la aktorad-teamo!
 Transiru ni al sekva paragrafo
 rapide nun, ĉar nin laŭ la programo
 post duonhoro jam atendas kafo."
 Pri dram-enhavo aŭ la arta ĝuo⁴
 neniu diras ajnan⁵ opinion.
 Raportos poste oni en revuo:
 Teatra grup' prezentis bone ion.

1. programmapunten 2. handig, bekwaam
 3. vurig 4. genot 5. eender welke

Finna aŭtorino, naskiĝis en 1948.

Pri la titolo: La arto por la arto: devizo de
 skolo, por kiu la arto devas havi nenian utilan
 aŭ moralan celon.

Noto: Ĉu arto *pro* aŭ *por* la arto?

Kp. PIV sub 'pro': *La distingo inter kaŭzo
 kaj celo de ago ne estas ĉiam klara kaj tial
 la prepozicioj por kaj pro povas havi
 sencojn preskaŭ identaj.*

Relegu la tutan poemon kaj rimarku la
 striktan regulecon. Reguleco de kio?

- 1) de la longo de ĉiuj versoj,
- 2) de la alternado de la rimoj.

Pri la unua strofo:

Montru ke estas kontrasto inter la unuaj tri
 versoj kaj la kvara.

La unuaj tri impresas laŭde, pozitive. La
 kvara siaflanke ne tro flate°. *vleiend*

Efektive, du rimarketoj forte kontrastas
 kun la enkondukaj impresoj. Kiuj?

| Tiuj de la lasta linio!

Kion ili sugestas?

| Ili ĵetas ne tre favoran° lumon *gunstig*
 sur la aktivecojn de la klubo.

Dua strofo: Jen ĉifoje laŭdaj rimarkoj! Kie?

Tria strofo: Amuza kontrasto inter la
 entuziasmo kaj ...

Kiu sola vorto alportas tiun kontraston?

| /tamen/

Kvara strofo: per kiu tono la gvidanto
 parolas? Kial? ...

Relegante nur la lastajn vortojn de ĉiuj
 versoj de tiu ĉi strofo, rimarku la evoluon
 de la etoso°! *stemming, sfeer*

Kia estas la tono de la lasta strofo?

| Ĉu (milde aŭ forte) severa? sarkasma?
 ironia? ridindiga? malestima? humiliga?
 amika?

Kion ni pensu pri la arto, ridi pri siaj propraj
 faroj?

ŜUSTR 25 JAROJN PREZIDAS LA KLUBON ! Eli Urbanova

Iam vi ŝajnis al mi stranga.

Pardonon, nome eĉ tro granda.

Kial vi tiel multe kreskis?

Iam vi por mi fremda estis,

jes, vi, sinjoro prezidanto,

simile kiel Esperanto.

Nun mian fruntan kovrus nubo.

se vi nur mankus en la klubo,

se vi malsanus --- ne, neeble!

Mi vin bezonas tie nepre°! *beslist*

Vi hom' unika . . . Jen konvinko.

Ĉeĥa aŭtorino, naskiĝis en 1922.

Ne eblas legi tiun ĉi poemeton sen

bonanima° rideto, i.a. pro... *goedmoedig*

la naiva, senmalica° tono kaj *argeloos*

la komika efiko de ŝajne solenaj eldiraĵoj.

Ekzemple...

Ĉar ambaŭ poemoj raportas pri

okazaĵo, la ĉi-sekvanta teksto estas...

leksikologia esploro pri la vortradiko

- PORT-

LA VOTRADIKO - PORT-

» Bazasence.

Kiel nomiĝas la viroj, kiuj en stacidomoj portas (portis?) la pakaĵojn de la vojaĝantoj?

| Ili estas la (bagaĝ)portistoj. *van deze*

Kiu liveras korespondaĵojn al ties° adresatoj?

| Tio estas la tasko de leterportisto.

Kian telefonon oni povas uzi eksterdome?

| Porteblan telefonon, poŝtelefonon.

Aliaj portebaj aparatoj estas ekzemple...

| Poŝtelevidilo, poŝkomputilo, poŝmapo, poŝhorloĝo kaj similaj.

Kiel oni portas bebon? valizon?

| Bebon en la brakoj, sur la brako; valizon per la mano aŭ sur la ŝultro.

Kun kiaj malsanuloj oni evitu kontakton?

| Kun portantoj de kontaĝaj mikroboj.

Porti vestojn° laŭmodajn, eksmodajn = ?

| Havi sur si, surhavi tiajn vestojn. *kleding*

Vesto homon prezentas^Z = ? *schatten*

| Ofte oni taksas° homon laŭ la vestoj, kiujn li portas. Ĉu prave°? *terecht*

Kion pensi pri la portado de fantaziaj vestoj?

| Jen amuza kutimo de iuj, sed nek ĉiam nek ĉie rekomendebla !

Kian silkan° bluzon oni portu? *zijden*

| Bluzon el neĉifebla° silko. *onverkreukelbaar*

'Porti' figurasence: Kion signifas jeno:

La firmao konsentas porti ĉiajn elspezojn?

| Pagi, okupiĝi pri la pago. *uitgaven*

Kion Z. volis diri per la esprimo porti la

ŝarĝojn° de la vivo? *vracht, last*

| Okupiĝi pri la (penigaj°) *moeitevolle*

laboroj, pri la zorgoj, la devoj°. *plichten*

(kaj kio estas la 'portotaj ŝarĝoj'?

| La ŝarĝoj, kiuj estos portataj).

N.B.: Kiel diri: la ŝarĝoj, kiuj (devas, devos, devis, devus) esti portataj?

| La portendaj ŝarĝoj.

Kiun nomon portas la infano de divorcintaj gepatroj? Ĝi portas....

Atentu: Iemand op (de) handen dragen = ?

| Multe admiri, honori iun.

Zorg dragen voor zijn boeken, zijn tuin, zijn kleren, zijn uitspraak =

| Zorgi pri sia ĝardeno,, siaj libroj, siaj vestoj, sia prononco.

Flegi° sian ĝardenon, siajn *verzorgen* librojn, siajn vestojn ktp.

Kp.: Een merrie draagt elf maanden.

| Ĉevalino estas graveda° *drachtig* dum dek unu monatoj.

» La radiko PORT en derivaĵoj° kaj

kunmetaĵoj° *afleidingen en samanstellingen*

Alporti.

Kiu birdo laŭdire alportas la bebojn al la

familioj? La cikonio°. *ooievaar*

Resumo de la vivo laŭ Z.: Naskiĝu, edzi-- kaj mort-- --- ĉiam monon^Z.

| Naskiĝu, edziĝu, mortu....alportu !

Konkludo? --> Nenio estas

senpaga.

Klarigu la proverbon: Unu hirundo° *zwaluw*

printempon ne alportas^Z. *overwinteren*

| Hirundoj travintras° en landoj kun dolĉa vintra klimato. Laŭ populara kredo, ilia reveno..... *anoncas la printempon.*

En pli larĝa senco: Oni povas nenion...

| konkludi el ununura ekzemplo (PIV).

Alia Z: Bonfaraj° alportas benon°.

Al kiu? *weldaden, zegen*

| Al la bonfaranto, -into!

Ĉu vi kredas tion? Anstataŭigu laŭplaĉe la vorton beno per alia vorto, ekzemple...

| moralan kontentiĝon? memkontentecon?

memsufiĉecon°? *zelfgenoegzaamheid*

malmodestecon°? *onbescheidenheid*

bonan sanon?

Kiu vorto mankas en Z: Tempo kaj

cirkonstancoj alportas^Z?

| saĝon°, (saĝecon). *wijsheid*

Kiel klarigi tiun proverbon?

| Maljuniĝante kaj travivinte multajn

situaciojn, oni iĝas (iĝus) pli saĝa.

Klarigu: Senlaboreco ...° alportas^Z. *dormon*

| La nenifarado, senaktiveco, maldiligenteco¹ estingas² ĉian emon³ al agado.

¹gebrek aan ijver ²uitdoven ³neiging tot (Eble jen frazeto ripetinda parkere?)

Resume: Kiu aŭ kio el A alportas ion el B?

A) cikonio	cirkonstancoj	bonfaroj
	senlaboreco	tempo
		hirundo
B) printempon	dormon	saĝon
benon	saĝon	bebon

Jen alia derivaĵo: **Disporti**. *rondbrengen*

Disporti manĝaĵojn, sciigon° =? *mededeling*

| Porti al diversaj lokoj aŭ personoj.

Kia gazetaro emas **disporti/raporti**

klaĉ(aĵ)ojn? (*klaĉ+aĵ*) *kletspraat*

| La **gazetaĉoj**. (*gazet+aĉ*) *schandaalbladen*

Kp. Z.: **Ne ĉiu raporto estas... vera vorto^Z.**

Efektive, kio estas **skandalfranda°** (PIV)

gazetaro? *N.B.:frandi: snoepen*

skandalfranda: *verzot op schandaal*

skandalfranda gazetaro: *roddelpers*

Kion ni riproĉu al tia gazetaro? *laster*

| Ĝi raportas kaj **disportas** kalumniaĵojn°.

Elporti.

Kiel interpreti jenan konsilon:

Balaaĵon¹ el korto² eksteren ne elportu³?

¹*veegsel* ²*hof, binnenplaats, erf* ³*buitendragen*

Noto: Oni balaas la **rubon°** per *afval, vuil*

balailo° kaj ĵetas ĝin en la *bezem*

rubujon°. *vuilnisvat*

Balaaĵo=? *tio, kion oni balaas°*. *vegen*

Signifo de la supra konsilo?

| Ne **elmontru°** viajn *tentoon spreiden*

malbonajn intimaĵojn (PIV).

Hang uw vuile was niet buiten.

'Elporti' figurasence: *geneigd zijn te*

Kiam vundito emas° **sveni°**? *flauwvallen*

| Kiam la doloro iĝas **neelportebla**,

neeltenebla. *lot*

Klarigu: Sorton° malsaĝulo timas, saĝulo ...

elportas°^Z. *uithouden*

Distingu **elporti** kaj **subporti**! Ekz.:

Bonŝance fortika° seĝo povas min *stevig*

subporti°. *ondersteunen*

Dragen = porti, sed: *Zijn bemoeienissen*

waren vruchtdragend = ?

| Lia penado estis **fruktodona**.

Honger, dorst verdragen:

| Toleri, **elporti** malsaton, soifon.

Enporti kaj importi.

Se pluvos, **enportu** la seĝojn en la domon! =?

| = portu internen.

Kp. **importi** = ?

| Enporti en landon komercaĵojn aŭ aliajn aĵojn el eksterlando (PIV).

Forporti°. *wegdragen*

Joĉjo (la infano) ne lasu siajn ludilojn

senorde en la salono! Li...

| **forportu** ĉion en sian ĉambron.

Kunporti.

Por la promenado prefere kunportu ...

| pluvombreton, pluvmantelon, pluvkapuĉon!

N.B. Diru per du vortoj: *De regen valt bij bakken (uit de hemel).*

| Pluvas positele° (sitelo = ?) *'met emmers'*

Raporti (sekvo de la paĝo 2).

Kion koro portas, vizaĝo...

raportas°^Z. Klarigo? *(ver)melden*

Niaj sentoj, (tradicie lokitaj en la koro), estas ofte videblaj sur nia vizaĝo.

La vizaĝtraĵoj° povas *gelaatstrekken*

perfidi° ies sentojn. *verraden*

Kp.: **Se en kor' io sidas, vizaĝo perfidas^Z.**

Kia povas esti iu, kies vizaĝo nenion

raportas, nenion perfidas?

| Neŝancelebla, neŝanceliĝema, *onwankelbaar*

flegma, nesentema°. *ongevoelig*

N.B. Komparu: **kaŝema**, **hipokrita**.

| hipokrita: ne sincera, **ŝajniganta°** ne

posedatajn virtojn°. *voorwenden, deugden*

Reporti.

Klarigu la figuran sencon de Z.: **Vento**

sendita tondron reportos.

Ia ajn (eĉ nevidebla) ago havas videblajn konsekvencojn por la aginto. (kp. aginto, aganto, agonto!).

Transporti.

Kiel oni transportis aferojn antaŭ la uzo de

la rado? Kiun avantaĝon la invento de la **rado**

alportis al la homaro?

| Ĝi faciligis la transporton de aĵoj, bestoj kaj homoj.

La kvina rado ĉe veturado^Z. Pri kiu rado

temas? Figura senco?

| Pri la rezerva rado, kiu provizore faras nenion.

Figura senco: dirata pri senutila persono.

Rado malbona knaras plej multe^Z =?

Dirata pri iu, kiu malbone laboras sed tamen faras plej multe da bruoj (komentas, protestas, plendas^o ...). *klaagt*

Ĵeti bastonon en la radon = ?

Malhelpi la movon, ĝeni la agadon.

Ndl.: *Een spaak in het wiel steken.*

Pri kia rado temas en ĉi lasta citaĵo?

Pri rado kun radradioj, kun spokoj^o. *spaak*

Kio estas **daten^o-(trans)portilo?** *gegevens*

Objekto, uzata por savkopii^o *data opslaan*

(konser vi) datenojn ekster la komputilo

(ekzemple disketo, CD-romo, USB...).

Kio estas **portlito** kaj portseĝo?

Transportilo por kuŝanta aŭ sidanta persono.

Kio estas **rultapiŝo?**

Transportbendo movita elektre por transporti aferojn aŭ homojn.

» **Pliaj esprimoj kun ndl. 'dragen'.**

Iemand haat toedragen.

(Morte) malami iun.

Wees streng maar niet haatdragend!

Estu severa sed ne rankora.

Iemand op (de) handen dragen.

(Multe) ami kaj honori iun.

Honger, dorst, hitte, koude, grillen, beledigingen verdragen.

Elporti, elteni malsaton, soifon, varmegon, malvarmon, kapricojn, insultojn (ofendon).

Dat leed is niet te dragen

Tiu ĉagreno, malĝojo, sufero ne estas eltenebla (estas neeltenebla).

Mijn bemoeiingen hebben vrucht gedragen.

(een goede uitwerking gehad).

Mia penado bone efikis.

Gelieve zorg te dragen voor andermans zaken.

Bonvolu zorgi pri aliulaj aferoj, (flegi aliulajn aferojn).

3) Solvo de la antaŭa tradukpropono

- Vojaĝi estas mortige por antaŭjuĝoj (vojaĝado estas fatala), maltolerem(ec)o kaj malgrandanimo.

- Liberspiritajn (larĝanimojn), sanajn, kompatemajn (mizerikordajn) ideojn (opiniojn, konceptojn) oni ne disvolvas

(evoluigas), kiam oni restas rustfiksita en unu loko (Mark Twain).

- Se vi volas perdi viajn antaŭjuĝojn, vi devas vojaĝi/vi vojaĝu (Marlene Dietrich).

- Mi estas blinda, sed la vojaĝoj ĉirkaŭ la mondo malfermis (malŝtopis) miajn orelojn (Ray Charles). - Vojaĝi signifas (pli)larĝigi la koron (Allard Pierson).

- Ni vojaĝas por lerni (kiel) forgesi (Clem Schouwenaars).

- Kien vi devas vojaĝi /vi vojaĝu? La malproksimo kuŝas en via koro ((Rainer Maria Rilke).

- Ĉiu rigardas la limojn de sia propra vidkampo la limoj de la mondo. (konsideras ...kiel la limojn...).

- La limoj de mia lingvo signifas la limojn de mia mondo (Wittgenstein).

- Mono sole ne feliĉigas. Vi / Oni bezonas krome (aldone) akciojn, obligaciojn, oron kaj nmoveblaĵojn (Danny Kaye).

4) Tradukpropono por 2011-3.

Octrooien (Elsevier 9-7-2006).

(...) Octrooien bieden uitvinders bescherming. Aan de marktintroductie van een product of techniek zijn meestal jaren van kostbaar onderzoek voorafgegaan, en dat moet worden terugverdiend. Een octrooi biedt de uitvinder wat dat betreft meer zekerheid. Een alleenrecht van twintig jaar lijkt lang in een tijd waarin technologische ontwikkelingen elkaar snel opvolgen. Toch zijn dergelijke 'lange' octrooien nog niet achterhaald, vindt Alfred K. (...) Een aanvraagprocedure duurt anderhalf jaar en het octrooi gaat bij goedkeuring met terugwerkende kracht in vanaf dat het is aangevraagd. Bij sommige producten, zoals medicijnen, volgen dan nog jaren van onderzoek en praktijktesten. (...) Daardoor zijn er op het moment van de introductie op de markt nog maar een paar jaar over om de investeringen terug te verdienen en winst te maken. (...)

Vragen en/of opmerkingen uitsluitend en rechtstreeks aan de redacteur van de rubriek sturen: Emiel Van Damme,
Albert-I-straat 44, B-1703 Schepdaal.
e.mailadres em.vandamme@skynet.be

GRAVA MESAĜO DE LA KASISTO

Estimataj membroj de ESPERANTO NEDERLAND,

Ankaŭ en 2011 oni devas pagi la kotizon.

Ĉi-jare ĝi estas EUR 30,- por membroj kaj EUR 10,- por samhejmanoj.

Bonvolu pagi la kotizon antaŭ la 30-a de aprilo al:
ESPERANTO NEDERLAND, bankkonto 78.68.44.167
en Nijkerk.

Se vi havas demandojn, vi povas sendi retmesaĝon al la kasisto per: <kasisto@esperanto-nederland.nl>
aŭ sendu leteron al: Wald ten Hagen, Postbus 91,
3860 AB Nijkerk

Ĉu vi jam transdonis vian retadreson al ESPERANTO NEDERLAND? Donu ĝin, ĉar tiam ni povas sendi al vi rapide interesajn novaĵojn. Tio ŝparas multe da tempo kaj ankaŭ monon.

Ĉu vi ankaŭ regule vizitas la retejon <www.esperanto-nederland.nl>? Tie vi povas trovi multajn novaĵojn kaj informojn.

Ni bedaŭras ke la estraro ankoraŭ ne estas kompleta. Ni urĝe bezonas estraranojn kaj ni esperas ke vi pretas fari kelkajn taskojn! Vi povas ĉeesti kelkajn estrarkunsidojn kaj poste decidi ĉu tio plaĉas al vi!

Kun koraj salutoj nome de la estraro,
Wald ten Hagen

BELANGRIJK BERICHT VAN DE PENNINGMEESTER

Geachte leden,

De beste wensen voor 2011!!

Ook in 2011 moet er weer contributie betaald worden.

De contributie bedraagt EUR 30,- voor leden en EUR 10,- voor inwonende medeleden.

Wij stellen het op prijs wanneer u de contributie vóór 30 april 2011 overmaakt aan ESPERANTO NEDERLAND op bankrekening 78.68.44.167 t.a.v. ESPERANTO NEDERLAND in Nijkerk.

Mocht u vragen hebben, dan kunt u een email richten aan de penningmeester: <kasisto@esperanto-nederland.nl>. Of stuur een briefje aan: Wald ten Hagen, Postbus 91, 3860 AB Nijkerk.

Heeft ESPERANTO NEDERLAND uw emailadres al? Nee? Geef dat alstublieft door, dan kunnen we u snel en gemakkelijk informatie sturen en het bespaart geld.

Kijkt u regelmatig op de website <www.esperanto-nederland.nl>? Daar kunt u veel informatie en nieuwtjes vinden!!

Het bestuur is nog steeds niet compleet en we hebben nog steeds nieuwe bestuursleden nodig!! Kom eens een paar keer naar de bestuursvergaderingen en beslis later.

Met vriendelijke groet namens het bestuur,
Wald ten Hagen

VIVTENU LA ASOCION !

Karaj,

Mi lernis Esperanton en 1967 kaj ekde tiam mi uzas Esperanton: dum la vojaĝoj, dum kongresoj, dum kunvenoj alilandaj. Asocioj ne estas bezonataj por uzi Esperanton! Tamen: sen asocioj multaj aferoj ne povas okazi....

Ĉu vi deziras lerni kaj praktiki Esperanton dum studsemajnfinoj?

Ĉu vi kelkfoje metas informmaterialon pri nia lingvo en via biblioteko?

Ĉu vi kelkfoje havas budon por informi pri Esperanto?

Ĉu vi ŝatas legi FEN-X?

Kiu organizas la studsemajnfinojn?

Kiu eldonas novajn informilojn?

Jes, la kunlaborantoj de la asocio ESPERANTO NEDERLAND!

Tial ni bezonas ESPERANTO NEDERLAND.

Ni bezonas vin! Kiun taskon vi povas fari? Jam dum pluraj jaroj mankas sekretario! Ĉu vi ne havas iom da tempo? Ĉeestu kelkajn estrarkunsidojn kaj decidu poste!

Vidu per propraj okuloj: eble ja estas io por vi!

Ineke Emmelkamp,

estrarano informado: <info@esperanto-info.nl>.

KIEL MI ESPERANTISTIĜIS...

Kaj mi lernis Esperanton okaze de la intertempe preskaŭ

mitologia Teleac-kurso. Poste, de post 1972, mi vaste eklegis kaj ekstudis kaj konstatis, ke estas tiom da interesaj libroj, ke ne eblas ellegi ĉion. Samperiole mi ekkorespondis kun unu, du personoj, kiuj poste fariĝis vere bonaj amikoj. El tiu korespondado mi lernis multege, precipe pri Japanio kaj ĝia kulturo.

Ankaŭ legi kaj korespondi ne eblas sen iu formo de organizado: pluraj organizoj aŭ asocioj aperigas librojn aŭ diskojn, ili organizas korespondadon, revuojn ktp. Do, se vi opinias Esperanton utila, senchava aŭ eĉ nur interesa - kontribuu al ĝia daŭra ekzistado: ni bezonas pliajn homojn por "tiri la ĉaron". Prove ĉeestu kelkajn el niaj estrarkunsidoj kaj vidu, ĉu estas io por vi!

Gerrit Berveling, nuntempe prezidanto.

LA STUDIO-SEMAJNFINO EN MARTO

De la 18-a ĝis la 20-a de marto

okazos la venonta studo-semajnfino.

Loko: "DE STRUBBEN", Schoonloo, Drente.

Por membroj de ESPERANTO-NEDERLAND kaj NEJ la prezo estos EUR 60,- kaj por ne-membroj EUR 70,-.

Aliĝoj aŭ informpetoj ĉe: Juri Smolders,
Warmoesstraat 7, 1521 CH Wormerveer,
rete: <studosemajnfino@esperanto-nederland.nl>.

Nur informpetoj ĉe: Marijke Lathouwers,
tel. 0223-643781, rete: <lj.lathouwers@quicknet.nl>

ESPERANTO PUBLIKE

Tradicie ni konsideras la publikigon de artikolo aŭ eĉ mencion pri Esperanto sukceso. Ni devas persvadi redakcion de gazeto kaj ĝojas se ni venkas tiun baron, okaze aŭ regule (kiel faras Ans Heijstra). La ebleco publikigi kion ajn per interreto ŝanĝis tion. Precipe junaj esperantistoj scias la vojon al la ekranoj en la tuta mondo. Sen permeso aŭ alia interveno de redakcioj. Ĉu ankaŭ tiujn artikolojn inkluzivigi en nia rubriko? Logika respondo estas: "Jes" kaj tial ni volonte mencias novan artikolon de Douwe Beerd en la TTT-ejo:

<www.wanttoknow.nl/overige/over-de-politieke-kracht-van-taal/>

Alia legindaĵo titoliĝas: "Mi estas Richard kaj mi parolas Esperanton", <<http://j.mp/fFuGHB#esperanto>>, evidente de Richard van Schaik.

La artikolo aperis ankaŭ tradici-maniere en Groninger Studentenkrant de 10-01-2011.

Alia nekutima podio por mencio pri Esperanto estas libro. Joke Hoobroeckx atentigis pri libro, redaktita de Jac Aarts: "Drukke lezers". Ĝi enhavas artikolon de Frank van der Voordt "Bas en Erik in het Esperanto". Li atentigas pri iniciato de ESPERANTO NEDERLAND donaci al ĉiu parlamentano en la ĵus novelektita Dua Ĉambro libron de Godfried Bomans en Esperanto: "Pieter Bas" aŭ "Erik of het klein insectenboek". Tio okazis la 26-an de septembro 2002, pro la ĉiujara "Dag van de Talen". (Vidu Fen-X nov-dec.2002, p.4)

Rob Moerbeek raportas pri menciado de pluraj novaĵoj en la Esperantomovado en "Eén Wereld, Nieuwsbrief van de Wereld Federalisten Beweging Nederland", Jrg.34 Winter 2009, p.11 kaj krome en Jrg.34 Herfst 2009, p.8, pri laborgrupo "Monda Jura Ordo"- Esperanto, kun kurso gvidata de Rob Moerbeek.

Ans Heijstra sukcesis dufoje presigi respondon al publika letero en Noordhollands Dagblad. Unu je 31-12-2010 sub la titolo "Engels", alia je 29-1-2011, "Taalstrijd". Krome la kvartalgazeto De Geestmolen de 30-11-2010 publikigis senpage anonceton pri lernado de la lingvo.

Haarlems Dagblad de 3-1-2011 dediĉis artikolon al ludo por vekti apetiton ĉe nemanĝemaj infanoj. Ĝia nomo estas "Mangigi". Dat is Esperanto voor "te eten geven" diras la artikolo.

Fine: Nia membro Kees Neeft citas el Volkskrant 13-01-2011 historian interesaĵon pri la morto de Mieke van de Voort (1972-2011):

Ze was 1 meter 68. En ze ging met een camera en tien filmblikken naar China om daar door het land te trekken als onderdeel van een project voor de Shanghai Biennale', zegt haar vader Pieter van de Voort. Ze volgde hier het voetspoor van de communist Henk Sneevliet, die in 1921 door China was gereisd en zelfs Mao als partijleider zou hebben voorgedragen. Om te kunnen communiceren met de Chinezen had ze even snel Esperanto geleerd omdat ze wist dat oudere communisten deze taal hadden moeten leren om de wereldrevolutie te realiseren.

Ĉi tiun artikolon verkis la ĵurnalisto Peter de Waard. Interesa, ĉu?

Hans Bakker

NEDERLANDA ESPERANTO-KONGRESO KAJ

88-A GERMANA ESPERANTO-KONGRESO

de la 10-a ĝis la 13-a de junio 2011
en Münster/Vestf.

Kongrestemo: Najbaroj en Eŭropo.

En junio 2011 okazos interesa kongreso en Münster. Tiu germana urbo estas facile atingebla el Nederlando. Rekta trajno de Enschede al Münster en 80 minutoj!! Ĉu vi jam aliĝis? Ĉu vi pripensas aliĝi? Mi deziras atentigi vin pri kelkaj interesaj programeroj:

Vendredon, la 10-an de junio:

Ĉu vi konas Annette von Droste-Hülshoff? Manfred Retzlaff prelegos pri ŝi en la vendredo. La platdiĉa lingvo: kio ĝi estas? Uwe Joachim Moritz rakontos pri ĝi!! La vendredan vesperon vi povos fini trinkante ion en la kelo!!

Sabaton, la 11-an de junio:

GEA-estranaroj respondos al demandoj. Eble ni, el Nederlando, povos profiti de tiuj demandoj kaj respondoj. Aŭ ĉu vi pli ŝatas "labori" en la informstano en la urbocentro? Kvardek personoj povos viziti la Pacsalonon en Münster. Samtempe Gerrit Berveling festprelegos pri la kongresa temo: Najbaroj en Eŭropo.

Posttagmeze okazos publika kunsido de Germana Esperanto-Asocio, prelego pri politikaj perspektivoj por Esperanto en la Eŭropa Unio (prelego, diskutoj) kun Felix Zesch. Bert de Wit prelegos pri la problemoj pri klimatscienco kaj Werner Bormann pri la historio de GEA. Post la vespermanĝo sekvos agrabla programo: kantado kun la Dorskorbuloj.

Dimanĉe, la 12-an de junio, okazos je la 7.20 h diservo. Ĉu vi emas frue ellitiĝi? Post la matenmanĝo Rob Moerbeek informos vin pri la dana kontribuo al la Esperanto-kulturo.

Posttagmeze okazos du ekskursoj. Vi devas elekti: ĉu iri al Burgo Hülshoff aŭ migrado tra naturrezervejo. Vespere JoMo el Francio prizorgos gajan muzik- kaj dancvesperon.

Lunde, la 13-a de junio 2011 okazos la lastaj programeroj, diversaj fakaj kunsidoj kaj prelego de Uwe Joachim Moritz. Pri kio? Legu pri ĝi en la retejo pri la kongreso.

Mi ne menciis ĉiujn programerojn!! Ĉiujn detalojn de la programo vi povas trovi en la retejo:
<<http://www.esperanto.de/gea/GEK2011.html>>.

La poŝta adreso de la Loka Kongresa Komitato (LKK), Rudolf Fischer, Gustav-Adolf-Straße 2a, DE-48356 Nordwalde // telefono/faksilo/aŭtomata registriilo 0049 2573 / 626, poŝtelefono: 0151 / 51 33 67 94

Proksime de via hejmo okazos tiu ĉi kongreso!! Ne maltrafu ĝin. Aliĝu nun!!

Kore, Ineke Emmelkamp.

NEKROLOGO DE JOHANO POPTIE

Bedaŭrinde Johano Poptie mortis en la aĝo de 88 jaroj la 22-an de januaro 2011 en Sepólno Krajenskie (Pollando). Li naskiĝis en Nederlando. En la jaro 1953 li vidis en ĵurnalo anoncon pri kurso pri 'Esperanto' en la hejmo de S-ino Koopmans. Li fariĝis membro de la Utrecht-a sekcio de 'LEEN' kaj membro de la fervojista grupo 'FERN', de kiu li en 1956 fariĝis estrarano. Poste li estis sekretario de 'IFEF'. Li iris al diversaj Esperantaj renkontiĝoj kaj tie li renkontis la polinon Janina (Janka) Bankowska. Ili geedziĝis la 2-an de aprilo 2001 en Almelo. Unue ili iris al Utreĥto kaj poste al Almelo. Finfine en 2005 ili interkonsentis iri al Sepólno Krajenskie en Pollando. Dum la lastaj monatoj li sentis sin malforta. Oni entombigis lin en Pollando la 28-an de januaro en Sepólno. Kompreneble ni deziras al Janka multan forton dum kaj post la entombigo. Treege ŝi bedaŭras la morton de sia amegata edzo Johano. Li ripozu en paco. Kun li mi havis bonajn Esperantajn kontaktojn.

Gerda Dercks

MALFERMA TAGO DE UEA.

La printempa malferma tago de UEA okazos sabaton la 14-an de majo 2011 (10h00 -17h00).

Ĉi-jare pasas 500 jaroj post la apero de la famkonata libro "Laŭdo de l' stulteco" de Erasmo de Roterdamo.

Vera Barandovská-Frank prelegos pri Erasmo kaj Gerrit Berveling pri "Laŭdo de l' stulteco".

En la libro-servo ĉio estas rabatita je 10%, kaj krome estas specialaj ofertoj. E-filmoj estos montrataj. Kafo kaj teo kaj loterio estas senpagaj.

PRI LA 96-A UK.

Al la venonta Universala Kongreso (23-30 julio en Kopenhago) aliĝis fine de januaro ĉ. 1000 esperantistoj, el kiuj 50 el Nederlando.

Pri la unua loko konkurencas Francio kaj Germanio (ĉ. 130 kaj 120 aliĝintoj).

ZAMENHOFTAGO EN HAGO

Sabaton, la 18-an de decembro 2010, okazis en Hago la jam tradicia Zamenhoftago organizita de Internacia Esperanto-Instituto. Nederlando estis abunde kovrita de neĝo, publika transporto preskaŭ ne funkciis. Malgraŭ tio venis 16 el 26 aliĝintoj el diversaj regionoj de nia lando. Ili estis bonvenigitaj kun kafo, teo kaj kukoj.

La ĉefpreleganto Christoph Klawe el Trier, Germanio, sukcesis atingi la urbon ankoraŭ vendredonokte. Lia parolado havis la titolon "Esploroj pri la geografio en la romano "Kiel Akvo de l' Rivero" de Raymond Schwartz (1894-1972)". La rakonto disvolviĝas komence de la 20-jarcento parte en Berlino kaj parte en la eksfranca provinco Alzac-Loreno, aneksita de Germanio dum 1870-1918. Tie Schwartz mem havis siajn radikojn.

La enhavo instigis Christoph entrepreni serĉvojaĝon al la gravaj lokoj de la libro. La rezulto estis altnivela prezentado en klara lingvo.

Post lunĉo en apuda restoracio sekvis posttagmeza variaj programeroj. Margrit Bos, abelbredisto el Utrecht,



Foto de Shanne van Elk.

En la dua vico, dekstre, la ĉefpreleganto D-ro Christoph Klawe.

malkaŝis per bildoj la fascinantan vivon de la malgrandaj bestoj. Propraj spertoj ornamis ŝian rakonton. La kunveno finiĝis per Esperanto-kvizo kaj konatiĝo kun la reviziita eldono

de "Konversacia Vortaro" de Andreo Cseh.

Restis tempo por interbabilado kaj ni adiaŭis unu la alian en la malfrua posttagmezo, esperante senglite hejmeniri kaj revidi plurajn en la Instituto dum la "Filma Tago", la 12-a de februaro, aŭ la "Literatura Tago", la 26-a de marto 2011.

Els van Dijk.

NGGE-JARKUNVENO

NGGE estas la fak-organizo por instruistoj, sekcio de ESPERANTO NEDERLAND.

Ĝi okazigos la jarkunvenon la 12-an de marto en la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Roterdamo. La raportoj kaj kompleta tagordo troviĝas en la februara numero de "NGGE SCIIGAS", petebla ĉe la suba adreso.

Ni serĉas sekretariojn kaj kasistojn, ĉar Atilio Orellana Rojas nun laboras en Japanio kaj eksiĝis el NGGE; Julija Batrakova devas dividi siajn patrinajn zorgojn pri Maksim kun la profesia laboro, do petas anstataŭanton. Cetere ni promesis reveni al la temo, kiu malsukcesis en la studotago: prezenti Esperanton al la ĝenerala publiko. Eblas disdoni "Ontdek het Esperanto. Een fascinerende taal", kiun – miasperte – nur malmultaj rifuzas. Ankaŭ ideoj por la ILEI-konferenco en Kopenhago bonvenas.

Kiel daton de nia aŭtuna studotago ni proponas la 29-an de oktobro, kiu ne koincidas kun la studosemajnfino de ESPERANTO NEDERLAND. Se eble, ni havos prezenton de la Krakova instrumodelo, sed ankaŭ la vjetnama literaturo en Esperanto konvenas pro la Hanoja UK en 2012. Eble ĉi-foje kompetentulo traktos la supersignojn por komputila uzo. Se vi havas aliajn ideojn, bv. ne kaŝi! Kaj helpu nin varbi membrojn, ni petas. En premaj cirkonstancoj ĝuste Esperanto donas esperon.

Rob Moerbeek, kvazaŭ-sekretario,
Zwaansmeerstraat 48, 1946 AE Beverwijk.
Nova retadreso: <oovo14qh@kpnmail.nl>.

La redaktoro/protokolanto de NGGE estas S-ro S.P.Smits.

Lia e-adreso estas: <spsmits@hotmail.com>.

Ĝi aperis malbone en la antaŭa numero de Fen-X.

UK-KARAVANO(J?)

Estimataj, Pieter Engwirda kaj mi planas kune trajnumi de Nijmegen al Kopenhago la 22-an de julio. Ĉar la nederlanda fervojo ofertas nur noktan konekton, ni verŝajne enrajniĝos en KLEVE, Germanio. Antaŭvidata alventempo estas ĉirkaŭ la 22-a horo.

Se vi emas akompani nin, bonvolu kontakti min je <ro-esp@dds.nl>. Tranoktado de la 21-a al la 22-a de julio organizeblas.

Ĝis, Ronaldo N.

HEIDI GOES: ESPERANTO EN INDONEZIO: REPLIKO KAJ RAPORTO.

Subite, pro malsano, familiaj kaj aliaj problemoj, aperis malplena spaco en la januara numero de Fen-X. Necesis TUJ trovi solvon, tempo por interkonsilado mankis... Do mi prenis tekston el interreto - sed malfeliĉe mia solvo ne estis kontentiga por Heidi Goes. Ĉi tie ŝia reago.

Ko Hammer.

Kun surprizo kaj bedaŭro mi vidis ke en Fen-X (januaro 2011) aperis teksto el mia retejo pri Esperanto en Indonezio. La surprizo estiĝis pro tio ke mi ne sciis antaŭe kaj ke plaĉas al mi ke miaj tekstoj estas uzataj kaj supozataj legindaj. La bedaŭro tamen estis pli granda kaj pro pluraj kialoj. Unue, ne estas menciita la fonto (jen ĝi:

<<http://sites.google.com/site/esperantoenindonezio>>), tiel ke homoj povas esti tute konfuzitaj pri tio de kie venas tiu teksto (ĉar estis klare ke mi ne verkis ĝin por Fen-X kaj ne aperis mia nomo sub la teksto). Ne nur temas pri vi, la nunaj legantoj, sed ankaŭ pri la ontaj legantoj aŭ esplorantoj; mencio de fonto estas necesa. Due, ĝi ne rilatas nur al mia agado en Indonezio, ĉar ĝi estis verkita kiel enkonduko al la paĝaro por homoj kiuj tute ne konas min (kio laŭ mi ne plu estas la kazo kun la legantoj de Fen-X). Krom tio, la teksto estas verkita antaŭ mia dua instruvojaĝo al Indonezio, kaj la parto pri Indonezio, inkluzive de la fotoj, temas pri la unua vojaĝo.

Feliĉe mi povis verki ĝisdatan artikolon pri la dezirata temo: miaj lastatempaj spertoj en Indonezio, pri kiuj mi rakontis en la Malferma Tago. Sed ĉar mi tamen daŭre pretas tion fari kaj ĝojas sciigi pri miaj tieaj spertoj kaj aktivado, jen iom mallongigita versio de mia malfermtaga prelego.

La sukceso de mia instru- kaj esplorvojaĝo en 2009 instigis min fari similan vojaĝon ankaŭ en 2010 (23/9 – 16/10). La unua urbo en kiu mi instruis Esperanton estis Ĝakarto.

La unua grupo estis nur komencantoj. Alia grupo en la sama urbo konsistis el komencintoj. Mi renkontis por la unua fojo Abdul Haris Adnan, kiu memstare lernis kaj nun trovis samideanojn kaj helpas la grupon en Ĝakarta studi la lingvon.



Post la ĉefurbo, kiu situas sur la insulo Javo, mi vojaĝis nordokcidenten al Medan sur la insulo Sumatro. Tie Reza

Pahlevi zorgis pri tio ke mi povis instrui en lia antaŭa mezlernejo. Ĉar estis lundo, okazis la semajna ceremonio de flag-hisado kaj paroladoj. Mi rajtis dum ĝi prezenti min kaj Esperanton. Al entute tri grupoj, kiuj konsistis el 5 klasoj, mi instruis Esperanton dum po unu horo en tiu tago, kaj dum po plia horo en la sekva tago. Necesas emfazi ke antaŭ duona jarcento la E-agado en Medan estis vigla. Liong Soen Kiat kaj Hasan Basri instruis tie Esperanton kaj kune verkis unu el la plej grandaj vortaroj Esperanto-Indonezia en 1960.



Vespere dufoje kunvenis membroj de la gastiga reto Couchsurfing, kaj ankaŭ al ili mi klarigis pri Esperanto. Post tiuj du tagoj mi flugis al Batam, kie membroj de la sama reto kunvenis por eklerni Esperanton dum du sinsekvaj vesperoj.

Vendrede tagmeze mi reflugis al Ĝakarto, kie komenciĝis vespere la monda vegetarana kongreso, kiu daŭris post tio ankoraŭ kvar plenajn tagojn. TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio) havis budon tie. Tiu kongreso estis tre bona okazo varbi por Esperanto. Sabate mi prelegis pri TEVA, kiu estas longdaŭra membro de IVU, la Internacia Vegetarana Unuiĝo. En la fino de tiu prelego restis tempo kaj mi instruis la alfabeton, ciferojn kaj salutojn en Esperanto. Oni demandis pri E-klubo en Ĝakarto kaj mi povis respondi ke jam sekvatage ni kreas ĝin. Ĝi ricevis tiam la nomon 'Esperiga suno'.

Sekvatage mi instruis Esperanton en Bogor, al grupo da instruistinoj kaj kadruloj de privata lernejo. Ili kutime lernas kun la veterano Husadha Rijanto. Ni kreis klubon nomitan 'Ĉielarka revo'. Poste mi ankoraŭ instruis en Bandung, Semarang, Yogyakarta kaj Surabaya antaŭ ol reveni al Ĝakarto.

Tie loĝas profesoro de matematiko, Ravi Ahmad Salim, kiu memstare eklernis la lingvon kaj invitis min prelegi. Mi havis pli ol 200 aŭskultantojn (studentojn pri la angla kaj pri informadiko) en granda kaj bela salono. Unue parolis profesorino pri la graveco de lingvo ankaŭ por informadikistoj. Dum miaj du horoj mi donis enkondukon pri Esperanto ĝenerale, mi iom instruis kaj rakontis pri la historio de la movado en Indonezio.

Sekvatage mi forlasis la landon kaj kiam mi alvenis, la Ĝakarta grupo jam kunvenis. Ĝi organizas nun kurson en merkredo kaj dimanĉo po du fojojn monate kaj ankaŭ havis belan Zamenhoftagon.

Mi esperas ke post kelkaj jaroj povos fondiĝi nova landa asocio, kiel ekzistis antaŭ preskaŭ 50 jaroj. Mi volas fini kun dankoj al la Azia Komisiono kaj al tiuj individuoj – inter kiuj pluraj nederlandanoj – kiuj subtenis min finance tiel ke mi povis fari tiun vojaĝon kaj disdoni instrumaterialon. Dankon!

ALISE MEDINA EKSPOZICIOS EN NEDERLANDO.

Eksterordinara ekspozicio de 27-jara artistino fama en la Baltio, ankaŭ denaska esperantistino.



Aristids Medinâ jam esperantiĝis en la 60-aj jaroj, do en la soveta tempo, kaj estis aktiva kaj konata esperantisto en Latvio, delegito de UEA. En la Esperantomovado en Riga li konatiĝis kun fraŭlino

kiu lernis Esperanton en 1974. Ŝi, Lolita, kaj Aristids enamiĝis kaj ili geedziĝis en 1979. El tiu geedziĝo naskiĝis tri infanoj: Alise, Beate kaj Ernests. Alise (1984) estis la unua. La familio ofte partoprenis en Esperantotendaroj kaj akceptis multajn gastojn hejme. Do en la familio Esperanto estis ofte uzita lingvo. Kvarjara Alise jam ekpentris. La gepatroj entuziasme stimulis ŝian talenton. Post la gimnazio Alise studis 7 jarojn en la Janis Rozentals Artlernejo en Riga kaj post tio en la Art-Akademio de Latvio (Pentrofakultato) kie ŝi akiris la diplomon de "Bachelor of Arts" en 2007 kaj la diplomon de "Master of Arts" en junio lastan jaron. Intertempe ŝi studis ankaŭ unu jaron en la Universitato de Porto, Portugalio, kadre de studenta interŝanĝa programo "Sokrates-Erasmus". Bedaŭrinde la patro Aristids ne spertis la doktoriĝon de sia kara filino, ĉar li subite mortis en la vintro de 2009. Tamen Lolita kaj Alise kuraĝe partoprenis la UK en Bjalstoko, kie ni rerenkontiĝis. Tie Alise ne nur faris belegan pentraĵon de la Foirplaco kie la bubo Zamenhof tiom ofte vagis, sed tie naskiĝis ankaŭ la ideo pri ekspozicio en Nederlando.

La desegnoteko de Alise Medina estas abunda kaj mirakle belega. Ne nur pentraĵojn ŝi kreis, ankaŭ librojn ŝi ilustris: "Donacetoj por Infanoj" de L. Jevsejeva kaj la poemaron "Antaŭen" de J. Rainis. Alise gajnis diversajn premiojn: en 2007 la "Art Symposium Marina 2007" kaj krome ŝi ricevis la "Albert Foundation Grant". Kaj ĝis nun ŝia krono estas la Unua Premio de la "Gallery Global Art 2010", konkurso por junaj artistoj el la Baltaj Ŝtatoj. Alise fariĝis la plej bona junartista de Baltio lastan jaron! Abundas ŝiaj ekspozicioj. Inter 2004 kaj 2010 ŝi partoprenis en 33 ekspozicioj, el kiuj 9 estis solo-ekspozicioj. Kaj ne nur en Latvio sed ankaŭ en Estonio, Germanio kaj Portugalio. Kaj nun do ankaŭ en Nederlando (la unua per Esperanto). Kaj tio okazos en tre speciala muzeo, nome la Jac Maris Atelier-muzeo en Heumen apud Nijmegen (Nimego). Jac Maris (1900-1996) estis la nepo de la mondfama pentristo Jacob Maris (1837-1899), konata reprezentanto de la Haga Skolo. Jac Maris ne nur pentris, sed estis ankaŭ konata skulptisto kaj keramisto (en PIV; ceramikisto). (Ĉu vi scias ke la ĉiujara internacia keramista ekspozicio/foiro en Plasmolen apud Heumen nomiĝas "KERAMISTO"? La iamaj iniciatintoj volis akcenti la internacian karakteron de la evento per la uzo de Esperantonomo). Jac Maris pro siaj keramikaĵoj estis

fama glazurspecialisto. Li loĝis kaj laboris en neordinara domo. Li nome aĉetis la ekspoziciejon kiun Heidemij (inĝenierkompanio) uzis dum la Mondekspozicio en Usono en 1913. Ĝi estis tre taŭga pro sia lumkupolo. Post lia morto tiu konstruaĵo fariĝis la "Ateliermuzeo Jac Maris" aŭ mallonge "Marisdomo".

Vi estas kore invitita fari artviziton al tiu muzeo de la 3-a ĝis la 30-a de aprilo ĉijare. Ĝuu ne nur la majstroverkojn de Alise Medina, sed ankaŭ la belegajn verkojn de Jac Maris en natura ĉirkaŭaĵo. La muzeo estas malferma merkrede de 14.00 ĝis 17.00 h, kaj sabate kaj dimanĉe de 13.00 ĝis 17.00 h. Kaj krome laŭ interkonsento (telefonu al 024-3580151 aŭ e-skribu al <akkers 10@kpnplanet.nl>). La adreso estas: Looistraat 57, 6582 BB Heumen (10 km. sude de Nijmegen, tuj apud la aŭtoŝoseo A73). Por informoj en Esperanto telefonu 024-3580320 aŭ e-skribu al <k.ruig@hotmail.nl>. Kaj bonvolu ankaŭ viziti la retejojn de Alise kaj la muzeo: <www.alisemedina.blogspot.com> kaj <www.marishuis.nl>.

La oficiala malfermo estos farata de (ankoraŭ sekreta) eminentulo dimanĉon la 3-an de aprilo je la 13-a horo. Venu, renkontu la artistinon persone kaj kuntrinku glaseton je ŝia sukceso en Nederlando kaj Esperantujo.

Inĝ. Kees RUIG, Malden/Heumen (NL)

LIBERA PENSO

Tiu filozofio / pensmaniero naskiĝis en Francio, la unua strukturita asocio naskiĝis en la jaro 1848. Ĝi emas fuĝi for de dogmoj kaj proponas uzi raci-kapablon.

Ĝi celas ĉefe apartigon inter ŝtato kaj eklezio.

Estas liberpensuloj unuopaj aŭ asocie starigitaj grupoj en 49 landoj de la 5 kontinentoj.

Vidu pri ateismo kaj libera penso en Jarlibro de UEA 2010, paĝon 61.

Nia majstro esprimis sin pri la Libera Penso:

"Mia projekto de neŭtral-religia kongreso celas ne la kreadon de ia mistika kulto, sed nur la kreadon de oficiala komunumo, al kiu povus aliĝi oficiale iu, kiu ne volas aparteni al ia religio gente-tradicia. Mi dezirus, ke religia liberpenseco (oni neniel devas konfuzi liberpensecon kun ateismo! Liberpensulo povas esti ateisto, sed li havas la rajton ankaŭ esti deisto), ricevu tian formon, ke ĝi fariĝu ne io efemera, sed fortika kaj hereda". El letero de Zamenhof al Sebert - 13-09 1. al Sebert, 13. III. 1913. (w-502)

En aŭgusto 2011 okazos grava kongreso de la liberpensuloj en Oslo (Norvegio). Tie ili klopodos starigi tutmondan organizon. Do ili alvenos al lingva problemo: kiel komuniki juste kaj efike? Pro tio ni proponas al vi nun vastskalan lobiadon.

Komprenoble ni estas je via dispono, kaze de demandoj. Jen la ĉefa retejo de Liberpensuloj:

<<http://www.cilalp.org/>>

Ni afable sugestas al vi, ke vi klopodu trovi en via lando la liberpensulojn kaj sendi al ili informmaterialon pri Esperanto. Tiel, alveninte en Oslo, ili eble venos al la konkludo, ke Esperanto estas la plej bona solvo ene de ilia grupo. Ni provu!!

Elkore salutas kaj antaŭdankas

Dom. Simeone, <dominique.simeone@laposte.net>,

Christian Rivière, <christian.riviere@laposte.fr>

Mirejo Grosjean, <mirejo.mireille@gmail.com>.



KIEL VAGLUMO.

En ĉiu havenurbo de la mondo ĝi troviĝas, kvartalo por kiu oni ofte uzas la terminon "varma kvartalo", kie oni povas aĉeti aŭ lui varmecon kaj amon. Sed malgraŭ tiu nomo, mi tie ĉiam nur spertas malvarman komercan etoson.

Tia kvartalo en Antverpeno es-

tas la loko, kie okazas la rakonto de Willem Elsschot, kiun tradukis por ni Bert Boon.

Tri brunkoloraj maristoj tie renkontis virinon, Maria van Damme, kiu imponis pro sia varma bonkoreco.

Ŝi eĉ donis al ili kartoneton kun sia adreso, kaj la trio volas viziti ŝin.

Tamen, eble ŝi poste timis pro nekonata estonto, kaj donis falsan adreson.

La rakontisto raportas kiel li decidis helpi ilin, kaj vane kun ili serĉas la afablan Maria en la malvarma, malluma kaj pluvoriĉa kvartalo.

Ĉe la tradukado Bert Boon devis venki kelkajn malfacilaĵojn, ĉar en la rakonto simplaj homoj uzas ĉiutagan lingvaĵon.

Iu parolas pri la trio kiel "rijstkakkers", ofenda nomo por homoj el tropikaj regionoj. Mi, en lando kun kolonia historio, bone komprenas ĝin, sed ĉu tio ankaŭ validas por legantoj en la tuta mondo?

Kaj kio estas "vaglumo"? En vortaroj ĝi apenaŭ estas trovebla, sed feliĉe, en la interreta enciklopedio Vikipedio estas bona klarigo.

Kaj jam antaŭ longe Boon demandis min pri la traduko de la vorto "indiëvaarder", kaj mi ne sciis bonan solvon. Nun mi trovas "hindujenŝipo". Ĉu vere tio eblas, adverbos kun gramatika finaĵo kiel parto de kompleta vorto? Mi ne scias.

Cetere mi nur povas konstati ke Boon tre zorge kaj precize kapablas transdoni al ni la etoson de la rakonto. Valora aldone estas la dulingva enkonduko de estrarano de la Willem Elsschot-asocio. Li klare montras ke la rakonto estas pli ol nura raporto pri serĉado, sed ke ĝi estas prezentado de la reciproka respekto por alia kulturo, inter la tri brunuloj kaj ilia gvidanto.

La kovrilo de la libreto montras bildon faritan de Julia Litvinova, kiu ankaŭ prizorgas teknikajn laborojn por Fen-X. La bildo donas al mi bonan impreson pri mistera vagado malluma, malvarma kaj malseka kvartalo.

Kvankam nur malgranda, la eldono vere feliĉigis min.

Tamen: unu plendeto. La nombro de paĝoj estas negranda, por doni al la libreto volumon, FEL uzis dikan paperon. Same kun "senfadena bindado" tio kaŭzas ke oni vere bezonas forton por malfermi ĝin. Tio ne agrabligas la legadon.

Ko Hammer.

Willem Elsschot: Kiel Vaglumo, Traduko de Bert Boom.
ISBN 978-90-77066-45-4. Eldono de FEL.
Preze EUR 10,- plus afranko.

"INSTITUUT ZAMENHOF" EN TOGOLANDO.

Wim Posthuma, nederlanddevena esperantisto kiu loĝas

en Svedujo, vizitis la lernejon "Instituut Zamenhof" en Togolando. Li partoprenis la jarfinan feston de la infanoj kaj de la instruistoj, la 18-an Togolandan Esperanto-kongreson kaj ankaŭ turisme traveturis la landon kun esperantista akompananto. Li revenis komence de januaro, tiel plenplena de impresoj kaj de entuziasmo, ke vi nepre legu iom en lia taglibro, kiun vi trovos per <<http://togo.posthuma.se>>.

Hans Bakker

CARO PETRO EN NEDERLANDO KAJ LA NEDERLANDA EN RUSLANDO

Kiel menciite en la antaŭa Fen-X, Caro Petro loĝis pli longe en Amsterdamo ol en Zaandam. La Caro-Petra domo en Zaandam estas mondkonata, sed ĉu vi scias kie li loĝis en Amsterdamo? Ĉe la Oostenburgergracht (kanalo), apud la Czaar Peterstraat. Sur la grandega tereno inter tiu kanalo kaj strato iam troviĝis la ŝipkonstruejo de la VOC. (Unuiĝinta Hindia Kompanio). Kaj tie la caro laboris kiel ŝipkonstrua ĉarpentisto.

Post la velŝipa periodo la vapormaŝinoj kaj dizelmotoroj populariĝis kaj sur tiu iama ŝipkonstrua tereno kreskis mondfama ŝipmotorfabriko: WERKSPOOR. Omaĝe al Caro Petro oni konservis lian domon kaj faris el ĝi malgrandan muzeon. Werkspoor kuniĝis kun Stork sub la nomo VMF (Verenigde Machine-Fabrieken) kaj pli poste la nomo ŝanĝiĝis al Stork-Werkspoor. Multajn jarojn mi laboris ĉe Stork-Amsterdam kaj tial kelkfoje vizitis Werkspoor, kie unu fojon oni montris tiun muzeeton al mi. Mi ne plu memoras, ĉu la muzeo estis nur "privata" aŭ ankaŭ malferma al la publiko. Werkspoor vendiĝis al la Fena kompanio kaj fine fermiĝis. Sur tiu terenego nun staras i.a. la oficejo de la ĵurnalo Het Parool kaj (en la malnova fabriko) bela konferencejo. Lastan jaron mi partoprenis kunvenon en tiu konferencejo kaj dum la lunĉpaŭzo mi nostalgie vagis sur la tereno, nun kun multaj oficejoj kaj laborejoj, i.a. de la urba puriga servo. Sed mi malkovris ankaŭ kelkajn konstruaĵojn, kiuj ankoraŭ apartenas al Stork. Ĉu la Caro-Petro-muzeo ankoraŭ ekzistis? Haste mi iris tiudirekten. Sed granda palisaro baris al mi la vojon. Kaj la tempo mankis ĉirkaŭiri ĝin. Do bedaŭrinde mi ne povis kontroli ĉu la muzeo ankoraŭ ekzistas. Eble Amsterdama esperantisto povus kontroli tion?

Post lia restado en nia lando la caro ankoraŭ iris al Anglio antaŭ ol reiri hejmen. Li persvadis aron da holandaj faklaboristoj kuniri. Tra Germanio tiu paca armeo iris Rusion. Sed en Berlino decidis postresti grupo de nederlandaj konstruistoj. Ili multe laboris en Berlino kaj la Holanda Kvartalo en Potzdam ankoraŭ memorigas pri ili. Sed same ilia influo sur la Berlinan dialekton. Same kiel en la rusa troviĝas nederlandaj vortoj en tiu urba dialekto, eĉ la berlina akĉento iom holandemas.

Fine: vi verŝajne ne komprenas la rusan. Tamen vi komprenos la ĉi-sekvan rusan anekdoton: Sur ŝipo en la haveno de Peterburgo staras "matros" garde ĉe la alira ŝipŝtuparo. Surŝipiĝas nekonata sinjoro kaj la matroso kontrole alparolas lin: "Kapitan?" "Njet" respondas la vizitanto. "Ŝturman?" "Njet". "Botsman?" "Njet". "Lotsman?" "Njet, Katzmann!" (juda familia nomo).

Kees Ruig.

REAKTIVIĜO DE SKOLTA ESPERANTO-LIGO

Ekde la jaro 2009 Skolta Esperanto-Ligo reaktiviĝis, kaj modernigis. Ĝi ankaŭ denove aperigas sian revuon "La Skolta Mondo" ne nur rete, sed ankaŭ papere.

Novaj retpaĝoj klopodas atingi la tutmondan skoltaron. Kun plezuro ni ĉi tie informas vin pri tiu kampanjo, kaj la redakcio de Fen-X esperas ke iu juna esperantisto en Nederlando bonvolas reprezenti la Ligon en nia lando.

La nuna reprezentanto, Ko Hammer (pli ol 80-jara), opinias ke li ja ne taŭge povas reprezenti junulan organizon!

Kadre de la SEL-Reaktiviga kampanjo, Skolta Esperanto-Ligo kune kun TEJO organizas trejnseminaron por junaj aktivuloj kun la ĉefa temo: Konstruante surbaze de diverseco aŭ kiel ricevi la plejbonon el interorganiza junulara kunlaboro?

La seminario okazos en Varsovio, Pollando, inter la 24-a kaj 30-a de majo 2011 (kun la 24-a kaj 30-a kiel vojaĝtagoj). La programo enhavas interaktivajn laborseĝojn pri teknikoj kaj metodoj de moderna laboro de junaj asocioj, kaj pri efikaj manieroj organizi junularon, uzante la temon diverseco kaj egalrajteco en la internacia agado. La partoprenantoj lernos praktikajn metodojn de interkulturaj aktivecoj kaj la uzon de variaj iloj de la Konsilio de Eŭropo. Ni ankaŭ vizitos la centran sidejon de ZHP (Pola Skolta Asocio) por diskuti ilian sperton en internacia kunlaboro. Krome ni vizitos la lokan grupon de esperantistoj.

Ni invitas junajn aktivulojn en la skolta movado kaj esperantistojn kiuj simpatias kun la skolta movado.

Danke al la subvencio de la Eŭropa Junulara Fonduso ni povas inviti 30 partoprenantojn, pagante la restadkoston kaj kontribuante al la vojaĝkosto. La aliĝkoto estas nur 70 eŭroj (por eŭropanoj) aŭ 100 eŭroj (por ne-eŭropanoj) por la 5-taga programo. Pro la limigita nombro de lokoj ni devos elekti partoprenantojn, por certigi la ekvilibron de nacieco kaj sekso, kaj la potencialan kontribuon al la programo. La limdato por aliĝi estas la 15-a de marto 2011. Frua aliĝo estas rekomendata.

Pliaj informoj kaj la aliĝilo haveblas ĉe:

<www.esperanto.org/skolta> aŭ ĉe la Organiza Teamo: <SEL.Reaktivigo@gmail.com>.

Se vi konas geskoltojn en via urbo, tio estas granda oportuno por prezenti Esperanton kaj inviti ilin partopreni la trejnseminaron. Al tiuj ni ofertas fulmkurson (retan/per Skajpo), por provizi ilin per la bazaj Esperanto-komprencapabloj kaj ebligi senperan komunikadon.

POLA RADIO ĈESAS ELSEENDOJN EN ESPERANTO.

3-a de februaro.

Hodiaŭ la prizorganto de la Esperantaj elsendoj de Pola Radio, Gabi Kosiarska, aperigis en la blogo "Amikaro de Pola Radio", en Facebook, jenon:

"Karaj Geaŭskultantoj, Karaj Radioamikoj, hodiaŭ ni havas por vi malĝojigan informon pri foresto de nia E-programo. Nome laŭ la decido de la Estraro de PR ekde

hodiaŭ mi ne plu povas okupiĝi pri ĝi. Ni klopodos baldaŭ liveri al niaj aŭskultantoj kaj amikoj pliajn informojn".

Eblas legi detalojn en Libera Folio:

<http://www.liberafolio.org/2011/finigis-la-esperanto-elsendoj-de-pola-radio>

Mi trovis paĝon de Polskie Radio <http://www2.polskieradio.pl/kontakt/> al kiu eblas sendi (senutilajn) protestojn (mi jam sendis), kaj retadreson (trovita en tiu paĝo) al kiu ankaŭ mi sendis proteston: sluchacze@... // (sluchacze = aŭdanto)

Se vi deziras, kiel mi, sendu per tiuj adresoj vian proteston.

La paĝo <<http://www2.polskieradio.pl/kontakt/>> tradukeblas per google-tradukilo, metante tiun adreson en la fenestreto: <<http://translate.google.es/>> ĝi kondukas al


<<http://translate.google.es/translate?.....ktp...www2.polskieradio.pl%2Fkontakt%2F>>

En la retpaĝo estas kontakta formularo, al kiu eblas sendi la proteston. Senutila, sed protesti ĉiam estas sana ekzerco."

<<http://www.esperanto.net>>

La 3-an de februaro 2011

Dario sendis la Komunikon al Ronaldo Nobel, kiu transdonas ĝin. // (ro-esp@dds.nl).



Andries Ott

TUTE NATURA.

En la naturamika domo "De Bosbeek" en Bennekom dum ĉirkaŭ tridek jaroj estis malgranda naturmuzeo, kun la nomo "Tute Natura" kiel parto de la asocio NIVON.

La esperantisto Andries Ott fondis ĝin, kaj ne nur instruis sian publikon pri la naturo, sed ankaŭ ĉiam informis kaj varbis

por Esperanto. Ĉiun dimanĉon ĝi estis malfermita, per la helpo de grupo de entuziasmaj libervolaj helpantoj.

Andries Ott jam dum longe ne plu povis aktivi en la muzeo, pro sia alta aĝo, sed lia helpantino Janny Pastoors fervore gvidis la muzeon.

En la lasta periodo ĉiam estis pli kaj pli malfacile trovi la necesajn helpantojn, kaj krome la estraro de "De Bosbeek" fakte volis uzi la lokon de la muzeeto por aliaj celoj, ekz. por bona, moderna laborejo.

Tial fine venis la decido: la muzeeto devis fermi siajn pordojn.

Ankoraŭ oni esperas ke la ret-paĝoj de Tute Natura povas resti kiel agado de la fondaĵo, kiel edukilo kaj informilo pri la naturo.

(informis: S-ino A. Noordewier).